

Karaj legantoj,

Mi scias ke pluraj membroj demandas sin ĉu la FEL-estraro faras ion utilan. Sur la sekvaj paĝoj vi povos konstati ke almenaŭ ĝi regule kunvenas.

Kun bedaŭro mi devas konstati ke la Flandra Esperanto-Ligo multflanke lamas, sed eĉ estrarano kun dekjara sperto estas sufiĉe senpova. Por mi jam de kelkaj jaroj estas neeltenebla situacio ke la aktiva membraro restas sen regulaj informoj pri la asocio, sed miaj petoj, plendoj, eĉ propono al la estraro por, en kazo ke neniu alia persono kapablis, mem prizorgi redaktadon de Vertikale, ne havis rezulton. Necesis iom da minacado por, precize 45 tagojn post mia oferto, ricevi la aperigotan materialon.

La kaŭzoj de la nuna letargio de FEL estas diversaj kaj urĝas solvo. Tamen, ankoraŭ pli urĝas informado. En ĉi tiu numero de Vertikale estas ĉiuj raportoj kiuj atendis publikigon. Kelkaj intertempe malaktualiĝis, sed mi preferis ne tuŝi ilin.

Komence de septembro (prezare al la ĝenerala kunveno de 14 septembro) aperos plia numero de Vertikale, kun:

- via reagoj al ĉi tiu numero;
- (eventuale) forgesita kaj postveninta materialo;
- la ideo de Ivo Durwael (kaj aliaj) pri restrukturigo de FEL, necesa i.a. pro la nova subvencisistemo;
- detala raporto pri la ĝisnuna stato de ĉiuj projektoj proponitaj dum la kolokvo de Leuven (MvdB bonvolu kunordigi - la promesitan liston de projektoj mi ne ricevis);
- komunikoj de la grupoj, ktp.

La tekstoj por tiu numero estu ĉe mi plej laste je la 26a de aŭgusto (adreso: Visspaanstraat 97, 8000 Brugge; telefono/fakso: 050-33.00.04; (prefere) rete: rotsaert@knooppunt.be).

La redaktadon de Vertikale mi transprenis - same kiel la prizorgadon de la Fondaĵo Vanbiervliet en Kortrijk - ne libervole, sed konstatinte ke dum sufiĉe longa tempo neniu sin okupis pri nepre farenda tasko. Ambaŭ taskojn mi ŝatus laŭeble rapide transdoni al aliaj personoj, por povi investi pli da tempo en miaj ĉefaj taskoj ĉe FEL: kasisto kaj kunredaktoro de Monato.

La tekstoj de Vertikale plejofte ekzistas en komputile legebla formo. Sufiĉas regule kopii la ricevitan materialon al la disko de komputilo. Mi taksas ke por la finpretigo estas bezonataj du vesperoj: unu por provizora enpaĝigo cele al provlegado, unu por la finpretigo. Kopiadon kaj forsendon prizorgas la centro.

Roland ROTSAERT

Ĉefa enhavo

Protokoloj de kunvenoj	3
Fondaĵo Vanbiervliet, Kortrijk	44
Interreto - KnoopPunt	55
Praktijksessie projectmatig werken, Leuven 22.6.1996	58
Manifest van Praag	62
Helpu ! Help !	64

Protokoloj de estrar- kaj aliaj kunvenoj

(se ne estas alia mencio, la kunvenoj okazis en la Esperanto-Centro)

Estraro, 95.06.17, 9.51-12.20 h.

Partoprenis: Ivo Durwael, prezidanto; Wim De Smet, vicprezidanto; Marc Cuffez, vicsekretario; Flory Witdoeck, kasisto; Walter van den Kieboom, estrarano.

Pardonpetis: Johan Van Eenoo, sekretario; Henny De Ketelaere, estrarano.

Ne pardonpetis: Jef Geraerts, estrarano.

Pro la neĉeesto de la sekretario, la vicsekretario akceptis redakti la raporton.

La prezidanto esperas povi fini la kunsidon je la 12.15a h., por havi sufiĉe da tempo por preni la trajnon al Rotterdam. Li tial insistas, ke dum la diskutoj oni restu ĉe la tempo por ne endangerigi tiujn tempolimojn; la vicprezidanto ege subtenas tion.

1. La raporto pri la estrarkunsido de la 20a de majo 1995

Oni konsentas ĝenerale pri la enhavo de la raporto. Oni trovis nur unu eraron: En la enkonduko, 10a linio: "vicprezidanto" (malĝuste skribita).

Marc Cuffez komunikas, ke en la Komisiono pri Interna Agado, Ghislain Jacobs ne estos membro. Li skribis leteron pri tiu afero. Katja Lödör kaj Ingrid Lievens restas membroj de la komisiono.

2. Raporto pri la funkcio kaj perspektivoj de la Esperanto-centro

Paul Peeraerts skribis raporton pri la funkcio kaj perspektivoj de la Esperanto-centro en Antwerpen, kaj ankaŭ Ivo Durwael skribis raporton pri tio. Nun estas problemoj. Ivo Durwael ne trovas la raporton. Oni decidis meti tiun punkton sur la tagordo de la venonta estrarkunsido. Oni ja havas kelkajn ideojn pri tio.

Wim De Smet diras, ke pasintan jaron li havis la ideon, ke la estraranoj havu pli bonan impreson pri la funkciado de la FEL-centro. La centro komenciĝis malgrandskale, sed en la daŭro de la jaroj, precipe kiam FEL transprenis la grafikan centron, ĝiaj rolo kaj respondeco fariĝis pli kaj pli gravaj. Plej bone estus, ke la estraranoj ĉiun monaton estas informitaj pri la situacio kaj funkciado de la pasinta monato kaj pri la venontaj semajnoj. Ekzemple pri financoj, Monato, salajroj ... Nun oni pagas 6-7 salajrojn, oni faras la revuojn, eldonas, sed la estraranoj apenaŭ scias ion pri tio. Kaj se estos problemoj la estraro devos solvi ilin.

Ivo Durwael komunikas, ke aperis du novaj libroj (poemaroj). (En la estonteco oni vidos la novajn eldonaĵojn.) Li ankoraŭ komunikas, ke la presejo ankaŭ presas revuojn por aliaj asocioj. Aperis ankaŭ nova Esperanto-dokumento: kolekto kun utilaj informoj pri Esperanto de 68 paĝoj por ĉiu kiu okupiĝas pri informado.

Kelkaj planoj:

- libro de Ernest Claes: "Kobeke"
- libro de Paul van Ostaijen (1996 = van Ostaijen-jaro(?))
- projekto pri UN-50-jariĝo.

Walter van den Kieboom diris, ke pri Paul van Ostaijen oni eventuale povus ricevi subvenciojn. La Flandra Komunumo donas subvenciojn sub la nomo "Vlaanderen in de Wereld". Pro la disvastiĝo de Esperantolibroj ni povus eventuale ricevi subvenciojn. Ivo Durwael esploras tion.

"Paul van Ostaijen" estos punkto sur la tagordo de la venonta kunsido.

3. Komisio al Roland Rotsaert koncerne la leĝon "Bescherming van de levenssfeer"

Ekde 1995 validas nova leĝo pri la protekto de privateco. Oni ne rajtas enkomputiligi iujn privatajn sciigojn, oni rajtas uzi la donitaĵojn en la asocia komputilo nur por la asocia celo de la asocio kaj la membroj rajtas inspekti la donitaĵojn kaj protesti kontraŭ ĝia enhavo. La instrukcioj de la Ministerio estas kompleksaj kaj aro da donitaĵoj estu liverita sur komputila disketo. Roland Rotsaert ricevas la komision por fari la necesajn paŝojn nome de la estraro.

4. Novaj dekretoj pri subvenciado

Oni decidis paroli pri tio en la nederlanda.

Ekde 01.01.95 estas 3 novaj dekretoj pri subvenciado. Estas dekretoj pri asocioj, pri instancoj kaj pri servoj. Ni povas ricevi subvenciojn nur kiel servo. Transiro-reguloj validas ĝis la 1a de januaro 1998.

Ni ankaŭ ne aliĝu al kupolo. Aliĝo al kupolo signifos, ke la plej granda parto de la subvencio supozeble absorbiĝos per la kupolo. Ni certe ne ricevus la sumon, kiun ni nuntempe ricevas (1.200.000 BEF). Ni ne rajtas mem fondi novan kupolon, ĉar tion malpermesas la dekreto. Ni devas plenumi kvar bazofunkciojn. La bazofunkcioj plenumebaj per FEL estas:

- havi dokumentocentron kun 1000 titoloj, 10 malsamaj revuoj;
- havi revuon kun pli ol 100 paĝoj;
- fari jare du edukajn eldonaĵojn;
- fari informokampanjon (ekz. la kursojn);
- deviga: doni 125 horojn da subteno al aliaj kulturaj organizaĵoj; ekz. por ni: la helpo al la biblioteko de Kortrijk; doni kursojn en aliaj kulturaj instancoj (ekz. 't Dakhuus, Antwerpen); doni kursojn en lernejoj ne estas konsiderata (ekz. La Konko, Oostende).

Unu aktiveco rajtas esti maksimume 35% de la bazaj aktivecoj. Eble ni devas ŝanĝi la statutojn, sed ni certe povas esti en ordo en 1998. Pro la fakto, ke la letero devis esti sendata antaŭ la 1a de junio, Ivo Durwael sendis la leteron sen konsulti la estraron kaj li anoncis, ke FEL fariĝos servo-centro.

Wim De Smet diris, ke ĉiuj asertoj de ministeriaj konsilistoj restas nefidindaj, se ili ne riceveblas surpapere.

Oni decidis doni fotokopiojn de la dekretoj al la membroj de la FEL-estraro, kiuj deziras tion. Oni parolos pri tio en venonta aŭ speciala kunveno.

5. Kunlaboro kun Esperanto-Nederland

Posttagmeze Ivo Durwael kaj Wim De Smet vizitos kunvenon kun reprezentantoj de Esperanto-Nederland (EN) en Rotterdam.

EN pensis pri komuna gazeto por Nederlando kaj Flandrio. Horizontaal povus esti tiu revuo (kiel Jen, por la junularo). Oni povus havi apartajn paĝojn por EN kaj FEL, kaj apartajn redaktorojn por la ĝeneralaj paĝoj, por EN kaj por FEL.

Wim De Smet diris, ke pasintan jaron Ingrid Lievens faris enketon pri Horizontaal, kaj ke la membroj ne estis kontentaj. Apud la propono de EN por esplori eblecojn de komuna revuo Wim De Smet relanĉas la ideon de komuna revuo kune kun BEF/Bruselo/APE. Nun Ivo Durwael kaj Wim De Smet iras al Rotterdam por esplori, kion la nederlandanoj volas.

Ivo Durwael opinias, ke la propono por transformi HORIZONTAAL al komuna revuo estas signo de kontenteco de EN pri ĝia nuna formo kaj enhavo. Krome komuna revuo malaltigos la prezon.

Flory Witdoeckt rimarkas, ke oni memoru, ke la speciala revuo de UN-50-jariĝo estas flandra afero, kaj se ni volas havi la subvencion de la Flandra Komunumo Horizontaal de septembro devas aperi nur por flandroj.

Oni devas ankaŭ legi la leĝojn por vidi, ĉu ni povas fari komunan revuon de Flandrio kaj Nederlando, sen perdi la subvenciojn.

6. Kolokvo: "Grenzen aan Veeltaligheid"

Vendredon la 23an de junio estos kolokvo "Grenzen aan Veeltaligheid" organizita de la "Taalunie", en Hotel Le Meridien, Europakruispunt 3, 1000 Brussel.

Sinjoro Symoens telefonis al Ivo Durwael, ke oni ankoraŭ povas aliĝi por la kolokvo. Wim De Smet iros kaj Ivo Durwael eble ankaŭ (FEL pagos la kostojn por Ivo Durwael).

7. La 11-tagaro de la Flandra Komunumo

Sinjoro Cwik, el Germanio, venos la 7an de julio en Antverpeno, por paroli pri federalismo. Tiu parolado de Cwik povus esti aranĝo de FEL dum la 11-tagaro (1-11 julio). Li parolu en Esperanto pri "Vlaanderen in een federaal Europa".

8. Oficialaj Esperanto-kursoj en Antwerpen

Ivo Durwael komunikas, ke li havis kontaktojn kun la skabeno pri instruado, sinjoro Verstraelen. Li partoprenos akademian kunsidon. La direktorino de la lernejo en Quellinstraat disdonis faldfoliojn al studentoj de lasta jaro de mezlernejoj kaj afiŝojn en ĉiuj lernejoj.

Oni ankaŭ metos artikolon pri Esperanto en la gazetoj: "Band", "Kindervreugd" kaj "Stadskrant".

Ivo Durwael ricevis liston de la eksgelnantoj kaj resumos spertojn de eksgelnantoj. Tion oni dissendos al la gazetaro, kun propono de intervjuo de iuj ekskursanoj.

En septembro oni faros kampanjon pri la Quellinstraat.

La 23an de septembro okazos akademia kunsido kun jena programo:

- festprelego de Jo Haazen;
- prelego de la skabeno pri instruado;
- prelego de la eksgelnantoj;
- honorigo de Rik de Roover kaj Edward Symoens;
- muzika ornamo de la kantaĵo Akordo.

Poste la familio Symoens regalos per akcepto en la Esperanto-domo.

9. Projektoj de FEL rilate al UN-50-jariĝo

Ivo Durwael komunikas, ke li ne havas novaĵojn, ĉar la konsila komisiono ne jam kunvenis. Oni petis subvencion por du projektoj: unu de 280.000 BEF kaj unu de 160.000 BEF. Sed la maksimuma sumo, kiun oni povas ricevi estas 250.000 BEF.

Pri la kolokvo ekzistas interkonsento kun Claude Piron, I. Peeters, G.C. Fighiera kaj B. Despiney.

Sed necesas estas tradukebleco je malalta prezo.

10. FEL-karavano al UK-Praĝo

Tio estas propono de Ivo Durwael. Li jam iris per buseto al Bergen (Norvegio), Vieno, Hungario kaj Ĉeĥio. Tio povas esti profitiga servo, sed ankaŭ riskhava.

Flory Witdoeckt proponas kontakti familion DVORAK por prepari karavanon al la UK en Praĝo, kaj Grégoire Maertens.

Ivo Durwael diras, ke li provos havi pretan programon en septembro: por vizito al la UK kaj unu semajno da turismado en Ĉeĥio. La estraro subtenas la proponon.

11. Diversaĵoj

* Wim De Smet donas impresojn pri la Eŭropa Kongreso en Parizo. Li ne estas tre kontenta. Oni ne sciis, ke jam estis alia kandidato por la kongreso en 1997: Stuttgart. Sekve oni decidis proponi Oostende por Eŭropa Kongreso en 1999.

Oni proponas, ke Ivo Durwael skribos leteron, ke Oostende estas jam nun kandidato por la Eŭropa Kongreso de 1999. Li povas paroli ankaŭ pri la bona situo de Oostende kaj la ebla vizito al Bruselo.

Walter van den Kieboom diras, ke (eble) estos UK-kongreso en 1999 en Berlin,

kaj ke la Eŭropa Kongreso en 1997 en Stuttgart devas esti vera Eŭropa Kongreso.

Flory Witdoeckt diras, ke la Kongreso en Oostende povus esti biologia kongreso. Tio estas propono de Grégoire Maertens. Oni pensas pri Wim De Smet kaj filo de Maertens (kiuj ambaŭ estas biologoj).

* Wim De Smet parolas pri la administrantarkunsido de BEF. Li verkos unu paĝon pri BEF kaj ĝia rolo. Por UEA nur BEF ekzistas kiel landa asocio, kaj ne FEL.

Flory Witdoeckt diras, ke lokaj grupoj devas paroli pri la rolo de BEF kaj ĝia estonteco. Tio estu tagordpunkto de la administrantarkunsido en Huizingen.

* Wim De Smet komunikas, ka pasintan ĵaŭdon okazis informkunveno de la "Europees Bureau voor Volksontwikkeling" pri "Aspekten van Volwassenvorming in Europa".

Evidentiĝas, ke ni ne estas informitaj pri eŭropaj subvencieblecoj. Nia ŝanco por akiri subvenciojn kreskas, se ni provas organizi ion kun Greklando, Portugalio kaj Hispanio.

* Wim De Smet ankoraŭ unu fojon diris, ke li iros al la kolokvo de la "Taalunie", vendredon la 23an de junio en Brussel.

* Ivo Durwael parolas pri la 80-jariĝo de sinjoro Symoens. Oni povas doni eble libro-donacon de 1000 frankoj en la Quellinstraat.

* Flory Witdoeckt parolas pri Germain Pirlot, kiu skribis leterojn al eŭropaj parlamentanoj. Iliaj respondoj aperos en la venonta numero de Horizontaal.

* Flory Witdoeckt kaj Ivo Durwael komunikas pri la Universitato de Santiago de Compostela. Tie junulo povas lerni Esperanton dum la somero. Ĉu oni subvenciu junulon? Ĉu ni pagu ion? La estraro disponigas 10.000 BEF por la vojaĝo.

* Ivo Durwael ricevis la rezolucion de Parizo de Claude Nourmont. Ĉu oni faru ion pri ĝi? Ĝi ne meritas dissendon al gazetaro pro malbona redaktado. Eble publikigi en Vertikale.

* Ivo Durwael parolas pri Antwerpen '96; tio estos FEL-aranĝo. La renkontiĝo en 1995 estis tre sukcesa: estis 63 partoprenantoj. Li jam ricevis kelkajn proponojn por renkontiĝo 1996:

- infanprogramo;
- fari la kunvenon dum Pentekosto-semajnfino;
- okazigi ekspozicion de muzikinstrumentoj (Hervé Gonin) en Etnografia Muzeo;
- gvidataj vizitoj;
- ion pri Paul van Ostaijen (1996 = van Ostaijen jaro).

* Pri la administrantarkunsido en Huizingen je la 25a de junio: Marc Cuffez vidis, ke Ingrid Lievens ne estas membro de la FEL-administrantaro. Do eble ne estos Komisiono pri Interna Agado en Huizingen, sed poste en Oostende aŭ Gent.

* Marc Cuffez ankaŭ demandas, ĉu oni oni ne povas krei membrokategorion kun kotizo de nur 50 aŭ 100 frankoj sen ricevi Horizontaal. Oni parolos pri tio en venonta estrarkunsido.

* En la administrantarkunsido de Huizingen oni parolu pri la rolo de BEF, ĝiaj rilatoj kun FEL kaj la rolo de brusela grupo.

12. Venonta estrarkunsido

Je sabato la 12a de aŭgusto je la 9.30a h. en la Esperanto-centro.

Raportis Marc Cuffez.

* * *

Administrantaro, 95.06.25, Junulargastejo Huizingen, 10.30-12.30 h.

Partoprenis 19 geadministrantoj inter kiuj, ĉiuj estraranoj: Ivo Durwael, prezidanto; Wim De Smet, vicprezidanto; Johan Van Eenoo, sekretario; Marc Cuffez, vicsekretario; Flory Witdoeckt, kasistino; Henny De Ketelaere; Jef Geraerts kaj Walter van den Kieboom.

La prezidanto Ivo Durwael malfermas la kunsidon je la 10.30a h. bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn en sunplena Huizingen.

1. Tagordo

Pro la fakto, ke oni vidas, ke oni ne havos sufiĉe da tempo, oni rigardas, kiujn punktojn oni povos priparoli hodiaŭ. Estas la punktoj 2/3/4/7/9/10/11/12 kaj la aliaj eble je la fino.

2. Informoj pri la novaj dekretoj pri subvenciado

Ivo Durwael diris, ke ekde la 1a de januaro 1995 ekzistas 3 novaj dekretoj pri subvenciado. Estas dekretoj pri asocioj, instancoj kaj servoj. Ni nur povas ricevi subvenciojn, se ni iĝos servo. Dum 3 jaroj (ĝis 1/1/1998) oni troviĝas en transira periodo. Provizore ni volas esti servo. Sed ni devas plenumi 4 bazofunkciojn. Jen la bazofunkcioj, kiujn ni povas efektiviĝi nun:

- havi dokumentado-centron kun 1.000 titoloj kaj 10 malsamaj revuoj;
- havi revuon kun pli ol 100 paĝoj;
- fari jare 2 edukajn eldonaĵojn;
- deviga: doni 125 horojn da apogo al aliaj kulturaj organizaĵoj, ekzemple la helpo en la biblioteko de Kortrijk.

Wim De Smet opinias, ke oni ne jam faru definitivan decidon, oni nur informiĝu: restas anoraŭ 2,5 jaroj por ŝanĝi.

Oni decidis distribui la tekstojn por legi hejme al kelkaj personoj: Marc Cuffez, Johan Van Eenoo, Flory Witdoeckt, Wim De Smet kaj Frans Croonen. Poste oni havos kunvenon por priparoli la dekretojn.

3. Festado de la 25-jara ekzistado de la urbaj kursoj en Antwerpen

- La antverpena skabeno pri instruado, s-ro Verstraelen, partoprenos en la akademia kunsido.
- La direktorino de la lernejo en Quellinstraat disdonigis faldfoliojn al lastjaraj mezlernejaj gestudentoj kaj afiŝojn al ĉiuj lernejoj en Antwerpen.
- Aperos artikolo pri Esperanto en la gazetoj "Band", "Kindervreugd" kaj "Stadskrant".
- FEL dissendos al la gazetaro leteron kun resumitaj spertoj de eksgelelernantoj.
- La 23an de septembro je la 14.00a h. okazos akademia sesio, pri kiu Ivo Durwael donas superrigardon: festprelego far Jo Haazen, prelego de s-ro Verstraelen, prelego de eksgelelernantoj, honorigo de Rik de Roover, muzika ornamo far la kanthoro Akordo.

Okaze de la 80-jariĝo de honora prezidanto Edward Symoens, post la akademia kunsido, la familio Symoens regalos per akcepto en la Esperanto-domo en Antwerpen. La eksgelelernantoj estu petataj kontakti ĵurnalistojn kaj proponi intervjuon.

Ĉar ne ekzistas alia propono, akceptiĝas la supra.

4. UN 50-jaraj - projektoj de FEL tiuokaze

FEL preparis kaj ensendis al la ministerio 2 projektojn, kiuj jam ricevis pozitivan apogon:

a. La aperigo de speciala numero de Horizontaal, dissendota al ĉiuj flandraj mezlernejoj kaj al la gazetaro. Ĝi enhavos superrigardon pri la historio de UN kaj artikolon pri la lingvaj problemoj en UN.

b. Internacia kolokvo en Antwerpen la 7an de oktobro 1995 pri la identeco kaj plurlingveco en internaciaj kontaktoj. Jam ekzistas konsento kun Claude Piron, I. Peeters, G. C. Fighiera kaj B. Despiney. Necesas nemultekosta tradukebleco.

Ĉiu asocio rajtas nur je unu subvencio (maksimume 250.000 BEF). Ni esperas, ke la ministro Van den Brande decidus sufiĉe frue pri tiu afero.

7. Eŭropa Kongreso en Oostende

La propono organizi la Eŭropan Kongreson 1999 en Oostende akceptiĝas per 18 por-voĉdonoj, neniuj kontraŭ kaj 1 sindeteno. La afero jam troviĝas en la tagordo de la EEU de la UK 1995 en Tampere.

8. La rolo de BEF: Vidu ĉe punkto 13. Diversaĵoj.

9. La Kataluna Esperanto-Asocio

La komitato de UEA decidu pri jena afero: la landa Hispana Asocio (HEA) estas membro de UEA. Leviĝas la demando, ĉu la Kataluna Esperanto Asocio (KEA) rajtas esti membro de UEA. La administrantaro decidu pri la voĉdono de nia komitatano Flory Witdoeckt. Ĝi memorigas la situacion en Belgio (BEF, FEL, APE) kaj decidus (16 por, 2 kontraŭ, 1 sindeteno), ke Flory Witdoeckt voĉdonu por akcepto de KEA.

10. Libro por Kubo

La administrantaro unuanime aprobas, ke FEL donacos pere de la familio Humet librojn al Kuba Esperanto Asocio kun maksimuma vendoprezio de 10.000 BEF entute. Ĉefe temas pri lernolibroj.

11. La 11-tagaro de la Flandra Komunumo (1-11 julio 1995)

Wim De Smet eksplikas pri "Vlaanderen 2002".

La 7an de julio s-ro Cwik el Germanio prelegos en la Esperanto-domo en Antwerpen pri federalismo en la Eŭropa Unio. Kun la konsento de la prezidanto de La Verda Stelo FEL organizos tion kiel FEL-aranĝon dum la 11-tagaro. Oficiala anonco farota.

Flory Witdoeckt ĉeestos la malferman konsidon (1an de julio), sed ne nome de FEL. La ferman konsidon (11an de julio) Wim De Smet partoprenos.

12. Simpozio "Grenzen aan Veeltaligheid"

Ivo Durwael, Wim De Smet, Edward Symoens, Kristin Tytgat, Hans Erasmus kaj Karel Van Steenberghe ĉeestis la simpozion "Veeltaligheid in Europa" organizita de Nederlandse Taalunie la 23an de junio 1995. Wim De Smet priparolas ĝojante pri la esperiga konkludo por Esperanto. Pli kaj pli, paŝon post paŝo kreskas favora influo kaj intereso ĉe politikistoj kaj eminentuloj (ekzemple d-ro Marc Galle) ekkoniĝante la Lingvon sen Limoj.

Ghislain Jacobs proponas starigi klubon de geeminentuloj favoraj al Esperanto kiuj pro ilia socia nivelo kapablas grave influi. Ekzamenenda de la Komisiono pri Eŭropa Agado.

13. Diversaĵoj

Ivo Durwael proponas novan Esperanto-dokumenton: proponaro por la Esperanto-informado (po 90 fr., 3 ekzempleroj kostos 180 fr.).

a. Antaŭaj protokoloj: akceptitaj.

Ghislain Jacobs proponas okazigi tuttagan administrantarkunvenon pri la ĝenerala agadplano de FEL. La administrantaro unuanime akceptas tiun ideon, sed por posttagmeza kunveno.

b. Priparoliĝas la rolo de BEF (vidu punkto 8.)

Walter van den Kieboom substrekas, ke, krom la multaj Esperanto-kursoj, ni sekvu ankaŭ alian vojon celantan decidpovajn personojn.

Wim De Smet opinias, ke per opinisondado surbaze de klara informo ni konsultu nian membraron. Ĉiu loka grupo pridiskutu la nunan situacion de BEF antaŭ la fino de la jaro. Wim De Smet pretas veni ĉe la kluboj por tiujn informi. La rezulto estos parto de la ĝenerala agadpolitiko.

c. Wim De Smet memorigas mortintan s-ron Leo Debruyne.

Raportis Johan Van Eenoo, sekretario kaj Marc Cuffez, vicsekretario.

Estraro, 95.08.12

Ĉeestis: Ivo Durwael (prezidanto), Wim De Smet (vicprezidanto), Johan Van Eenoo (sekretario), Marc Cuffez (vicsekretario), Flory Witdoeckt (kasistino), Jef Geraerts (estrarano), Henny De Ketelaere (estraranino), Walter van den Kieboom (estrarano).

1. Protokolo de la antaŭa kunsido

Revortiĝas la jenaj frazoj/vortoj:

- 8. 2a frazo: La skabeno partoprenos akademian kunsidon;
- 9. 2a frazo: Oni petis subvencion (...);
- 11. 4a steleto: Wim De Smet rememorigas, ke li (...);
6a steleto: Iliaj respondoj (...).

Korektinte kelkajn tajperarojn la estraro aprobas la protokolon.

2. Raporto pri la funkcio kaj perspektivoj de la Esperanto-centro

Kun la invito al ĉi tiu kunsido la estraranoj ricevis liston de la taskoj plenumitaj en la centro de majo ĝis julio 1995 (vidu estrarkunsidon 95.06.17).

La estraro konsideras tion utila, kaj akceptas, ke pro plia klareco ĝi donu ne nur la titolon de la faritaj taskoj, sed ankaŭ pli de informoj pri tiuj mem (ekzistas diferenco inter la eldono de ekzemple dekpaĝa libro kaj centpaĝa). Krome listiĝu ne nur tio, kio estas farita, sed ankaŭ tio, kio estas planita.

3. Kursoj de Santiago de Compostella

Pro manko de partoprenantoj la kurso en la universitato de Santiago de Compostella estas prokrastita ĝis 1996. La estraro decidas pli frue konigi la venontjaran kurson. Ivo Durwael tial perletere petu al Santiago informojn pri la kurso 1996. Ĝis venonta kurso la 10.000 BEF disponigitajn (vidu la estrarkunsido de 95.06.17) estos rezervataj.

4. Novaj dekretoj pri subvencioj

Ĉe FEL alvenis la "Uitvoeringsbesluiten" (ekzekuciaj direktivoj) pri la dekreto pri subvencioj al socikulturaj asocioj. Nova en tio estas la "Aankondigingsformulier" (anoncformularo) havigenda plenigita al la ministerio minimume 14 tagojn antaŭ la aktiveco. La estraro decidas, ke:

- la lokaj kluboj sekvos tiun proceduron serioze ekde septembro 1995;
- Ivo Durwael dissendos al la lokaj kluboj klarigon pri la proceduro;
- pri la adapto de la statutoj al la nova dekreto pri subvencioj decidis la administrantaro.

5. Aliĝo de FEL al la "Vlaamse Culturele Koepel"

Ivo Durwael renkontis s-ron Rob Eyckens, direktoron ĉe la Vlaamse Culturele

Koepel. S-ro Eyckens prezentis sian organizon kaj proponis, ke FEL aliĝu. La kotizo estas po 3.500 BEF jare. Plej interese pri la Vlaamse Culturele Koepel por FEL estas, ke ĝi akceptas plurismajn, neŭtralajn asociojn agantajn sur la kultura kampo.

FEL jam estas membro de la Vlaams Studie- en Documentatiecentrum voor VZW's; tiu pritraktas la juran flankon, ne la kulturan, de la agado.

La estraro aprobas la membriĝon de FEL al la Vlaamse Culturele Koepel.

6. Kunlaboro kun Esperanto Nederland

En junio Ivo Durwael kaj Wim De Smet vizitis kunvenon kun reprezentantoj de EN en Roterdamo. La estraro de Esperanto Nederland kunvenis en julio 1995 por preparoli eblecojn kaj oportunecon de Horizontaal kiel komuna revuo. Leteron kun la ENa koncepto pri tio sendis al FEL s-ino Ans Bakker, prezidantino de EN. Ivo Durwael laŭlegas parton el ĝi. Delegacio de EN venos al la antverpena Esperanto-centro sabaton la 16an de septembro ja la 11a h. La FEL-estraro kunvenos je la 9.30a h.

La FEL-estraro kun malgranda aldono akceptas la ENan koncepton, kaj surtabligos jenajn proponojn dum la komuna kunsido okazonta 16.09.1995 je la 11a h. en la Esperanto-centro Antverpeno:

- 1) Al la rubrikoj, kiujn EN proponas, ni proponas aldoni tekstojn pri: lingva diskriminacio, lingvaj problemoj, lingva konscio, lingvaj aplikoj, hobiaj aŭ ŝattemoj (en Esperanto).
- 2) Eventuale unu aŭ du specialaj numeroj de Horizontaal jare por la ekstera publiko.
- 3) Redakta komisiono por la FEL-parto en Horizontaal: s-ro Eddy Raats estos petata gvidi ĝin, kaj la redaktoroj de lokaj klubgazetoj en Flandrio estos invitataj partopreni en ĝi.
- 4) Redakta komisiono por la nederlanda parto en Horizontaal.
- 5) Ĝenerala redaktoro por la komuna parto.
- 6) Guido Van Damme estos teknika redaktoro.
- 7) Sistemo de diversaj koloroj laŭ la lingvo aŭ laŭ la flandra-nederlanda-komuna parto.

7. La 11-tagaro de la Flandra Komunumo

La 7an de julio s-ro Cwik (Germanio) parolis en Antverpeno pri federalismo: "Flandrio en federala Eŭropo".

Dum la organizaĵo en Kortrijk la lan de julio Flory Witdoeckt sukcesis kontakti plurajn gravajn personojn. En la organizaĵo de Bruselo, la 11an ĉeestis Wim De Smet. Venontjare ni instigos niajn lokajn grupojn por entrepreni pliajn iniciatojn.

8. Oficialaj Esperanto-kursoj en Antverpeno (25 jaroj)

La jubilea festo okazos la 23an de septembro. Ivo Durwael donas superrigardon pri la propagando aperigota en la gazetaro. La estraro akceptas la proponon dissendi belan invitkarton al la geekslernantoj kaj la honoraj gastoj dum la venontaj semajnoj. Adresoj endoneblaj ĝis la 7a de septembro.

9. FEL-karavano al UK 1996 en Prago

Ivo Durwael ripetas sian proponon de 17.06.1995 organizi FEL-karavanan al UK en Prago ekde la mezo ĝis la fino de julio 1996. La restado estus dusemajna: turismo dum la unua, UK dum la dua semajno. Per la familio Dvorak en Ĉeĥio FEL povus rezervi por 18 personoj loĝlokon atingeblan per la metroo. La estraro aprobas.

10. Diversaĵoj

a) Rilate al la van Ostaijen-jaro 1996 FEL ekzamenas kunlaboron kun la antverpena urbestro. Bedaŭrinde la urbestro fokusiĝas nur al la antverpena publiko. Tio ne estas interesa por ni. Eble ni povos kunlabori kun la Flandra Komunumo. Henny De Ketelaere mencias pri infovespero la 19an de septembro, kiun ŝi partoprenos.

b) El la Eduka Fondaĵo Carson venas demando, ĉu FEL havas aŭ havos projekton apogeblan de la Fondaĵo. Respondo: se tian projekton ni antaŭvidas, ni sciigos pri ĝi al la Fondaĵo.

c) Por diversigi la FEL-afiŝon la estraro akceptas la proponon de Guido Van Damme uzi la internan flankon de la Horizontaal-banderolo kiel afiŝon, komence de septembro 1995, kaj ŝanĝi la surprasaĵon ĉiuseptembre.

ĉ) Pri la repago de vojaĝkostoj de estraranoj jam ekzistas decido (13.03.1995). Plia decido pri tio estas afero pritraktenda dum la sekvonta administrantarkunsido.

d) Anonciĝas, ke Margriet Hermans serĉas 20 gekandidatojn por sia familia prezentado en decembro 1995 en Antverpeno.

e) Ivo Durwael informas la estraron, ke la projekto Symoens ekas per informado pri la celoj kaj intencoj de la projekto. Unue eldoniĝos dokumentoj en la nederlanda. Poste en aliaj lingvoj, depende de la petoj de Esperantistoj-aktivuloj. Se necese Johan Van Eenoo pretas traduki.

f) La 17an kaj 18an de oktobro organiziĝos informa kunveno pri la adapto de Matriĥta Traktato.

g) Okazos dum la semajnfino de 30.09-01.10.1995 la alternativa libroborso "Het Andere Boek" (La Alia Libro) en la urba festejo antverpena. La estraro decidas, ke, ĝis la situacio ŝanĝiĝos, FEL ĉiufoje partoprenos en ĝi per stando (kostas nun 3000 BEF).

ĝ) Pri la UK 1995 en Tampere raportas Wim De Smet, laŭdante la bonan organizon kaj la agrablan etoson. Ĉeestis ĉirkaŭ 2500, el kiuj okulfrape granda delegacio el Azio. La rezolucio de la UK dissendiĝos al pluraj institucioj, kaj jam sendiĝis al la gazetaro.

Nia estraranino Flory Witdoeckt elektiĝis kiel komitatano C (kaj krome membrino de la Komisiono pri Financoj). El tio sekvas, ke Flandrio havas tri gekomitatanojn, ĉiuj el Okcidentflandrio. Valonio havas unu.

La Modelan Asembleon de UN partoprenis po unu el 23 landoj. Prezidis André Ruysschaert. La Asembleo pritraktis la temon de la minoritatoj.

Nova prezidanto de UEA estas s-ro Lee Chong-Yeong el Koreio.

La estraro aŭskultas la rektan, pertelefonan intervjuon de Flory Witdoeckt kun BRTN.

h) Pri la Simpozio de la Nederlandse Taalunie (23.06.1995, Bruselo) Wim De Smet verkis tekston en Horizontaal.

ĥ) La distribuo de informoj en la FEL-estraro eksperimente fariĝos per skatolo en kiun metiĝos ĉiuj ricevitaĵoj kaj dokumentoj. Ĝi troviĝos en la 2a etaĝo de la Esperanto-domo kaj malsupreniĝos okaze de estrarkunsidoj.

i) Pri Kariljono ni ricevis neniun novaĵon.

j) Anonciĝas la venonta Limburga Tago.

ĵ) Ekzistas planoj por repreni la Markolan Kongreson. La estraro opinias, ke la organizado estas de la kvar koncernitaj provincoj.

k) La venonta administrantarkunsido okazos la 14an de oktobro, je la 14.00a h. en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno. Pritraktiĝos la agadpolitiko de FEL surbaze de la nova dekreto pri subvencio de socikulturaj asocioj. Ivo Durwael buŝe eksplikos pri la dekreto. Je la 9.30a h. kunvenos la estraro samloke.

l) Flory Witdoeckt proponas ekestigi novan membrokategorion de subtenantoj, ebligante la aliĝon de inter alie influhavuloj al FEL. Propono pritraktota de la administrantaro. La sistemo de subtenantoj de FEL jam du fojojn kolapsis. La estraro avizas organizi tian sistemon je la nivelo de lokaj grupoj.

11. Venonta estrarkunsido

La venonta estrarkunsido okazos la 16an de septembro 1995 je la 9.30a h. Je la 11a okazos diskuta kunveno kun Esperanto Nederland.

La estrarkunsido fermiĝas je la 13.05a h. Raportis Johan Van Eenoo.

* * *

Estraro, 95.09.16, 9.45-12.20 h.

Ĉeestis: Ivo Durwael (prezidanto), Wim De Smet (vicprezidanto), Johan Van Eenoo (sekretario), Marc Cuffez (vicsekretario), Flory Witdoeckt (kasistino), Walter van den Kieboom (estrarano), Jef Geraerts (estrarano).

Malĉeestis: Henny De Ketelaere (estrarino).

1. Ĉu tuttaga administrantarkunsido?

La lovena klubo "Esperanto 2000" proponas organizi tuttagan administrantarkunsidon la 21an de oktobro 1995, kontentigante la jam delongan deziron de ĝia klubano Ghislain Jacobs. Dum ĝi preparolatus la ĝenerala agadpolitiko de FEL.

La estraro rekonas moralan devon vidalvide Ghislain Jacobs. Ivo Durwael memorigas, ke la estraro dum la kunsido de 12.08.1995 decidis organizi duontagan administrantarkunsidon la 14an de oktobro 1995.

Konsiderinte la diversajn argumentojn kaj rimarkojn la estraro decidis unuanime okazigi:

a) posttagmezan administrantarkunsidon la 14an de oktobro 1995 en la Esperanto-domo antverpena kun la jenaj programpunktoj:

1) lokaj grupoj de FEL; 2) la rolo de BEF; 3) ebla adapto de unu punkto en la regularo pri administrantarkunsidoj; 4) demandoj pri la nova dekreto pri socikulturaj grupoj; 5) anonco pri ŝanĝoj en la statutoj sekve de la nova dekreto; 6) anonco de studotago en Leuven.

b) en Leuven kun "Esperanto 2000" specialan studotagon malfermitan al komitatanoj kaj invititaj aktivuloj pri la agadstrategio de FEL, inter alie pro la novaj subvencidekretaj.

2. Nova grupo en Turnhout

La nova Esperanto-grupo fondita en Turnhout ricevis startmonon de FEL kaj dankis perletere. La nova grupo petis esti membro de FEL.

3. Antaŭa protokolo

La raporto pri la pasinta estrarkunsido aprobatas kun la jenaj korektaĵoj. Korektitan version Johan Van Eenoo sendos al Cor van Ekelenburg por publikigo en Vertikale.

Ĉeestis: ... Marc Cuffez

3. ... - rezervi ĝis venonta kurso ...

4. Ĉe FEL ... (ekzekuciaj direktivoj) ...

7. La 7an de julio s-ro Cwik parolis en Antverpeno ... Dum la organizaĵo en Kortrijk la lan de julio Flory Witdoeckt sukcesis kontakti plurajn gravajn personojn ... pliajn iniciatojn. Dum la organizaĵo en Bruselo la lan de julio ĉeestis Wim De Smet.

10.ĝ) ... al pluraj institucioj, ...

Nia estraranino Flory Witdoeckt elektiĝis kiel Komitatanino C kaj krome kiel membrino de la Komisiono pri Financoj. ... La Modelan Asembleon de UN partoprenis po unu junulo el 23 landoj ...

h) ... Wim De Smet verkis tekston en Horizontaal.

ĥ) ... kaj malsupreniĝos okaze de estrarkunsidoj.

4. Detaloj pri la akademia sesio de 23.09.1995

La estraro fiksas la programon de la akademia sesio organizota en la urba lernejo en la Quellinstraat, Antverpeno, 23.09.1995, okaze de 25 jaroj da oficialaj Esperanto-kursoj tie.

Malfermo: 14.00a h. far Ivo Durwael.

Programo:

- kanthoro;

- alparolas s-ro Verstraelen, skabeno pri instruado;

- festparolado fare de s-ro J. Haazen, fondinto de la Esperanto-kursoj en la Quellinstraat;
- kanthoro;
- atesto(j) de ekskursan(in)o(j);
- honorigo de meritplenaj personoj;
- alparolo de J. Schram, prezidanto de La Verda Stelo, kaj honorigo de s-ro Rik de Roover;
- ferma ĥorkantado.

Poste: akcepto en la Esperanto-domo fare de la familio Symoens. La estraro notas, ke ĉi-jare estas en la Quellinstraat ok, eble dek, kursanoj en la unua, du en la dua kaj tri en la tria kursjaro.

Ĉar montriĝas, ke ekzistas pluraj demandoj pri la akirado de Esperanto-instruadiplomo kaj la uzado de tiu diplomo, la estraro ordonas, ke la Komisiono pri Instruado pristudu la eblecojn pri la instruado de Esperanto.

5. La agado de Germain Pirlot

Post la kritikoj en Horizontaal pri la agado de s-ro Pirlot kaj la respondoj al tiuj, la FEL-estraro interkonsentas pri la jena sinteno. La FEL-estraro:

a) admiras kaj aprobas la agadon de s-ro Pirlot, sed inter alie dubas, ĉu s-ro Pirlot volas labori en la kadro de FEL kaj sekve lasos al li labori kiel individuo. Ivo Durwael skribos leteron tiusenca al s-ro Pirlot.

b) decidis havigi utilajn FEL-eldonaĵojn al favoraj politikistoj.

6. La afero J. Vandemeulebroucke

Flory Witdoeckt, Wim De Smet kaj Edward Symoens sukcesis interparoli unu horon kun s-ro Vandemeulebroucke. Wim De Smet skizas la historion kaj la nunan situacion de la kunlaboro kun s-ro Vandemeulebroucke. Tiu proponis uzi Esperanton en opiniosondadoj en la Eŭropa Unio. La FEL-estraro trovas tion interesa, konsiderante la novan dekretan pri socikulturaj grupoj laŭ kiu FEL ŝanĝiĝu en servo. Tamen opiniosondadojn la estraro konsideras kiel profesian aferon. Flory Witdoeckt rekontakto s-inon Kesteleyn, membrinon de la Komisiono Kulturo.

7. Diversaĵoj

a) Invito pri "Concert 2000", Bruselo, sabato 30.09.1995, je la 20a horo.

b) El la raporto pri la fondaĵoj de BEF far Grégoire Maertens montriĝas, ke FEL ricevos 7.298 + 20.000 = 27.298 frankojn de BEF.

c) Atingis nin malrekte letero de s-ro Marco Picasso, merkato de Esperanto, kie proponas okhoran staĝon (sabato kaj dimanĉo). Pro tempomanko ni ne povas kunveni sufiĉe da personoj. Responda letero: la propono atingis nin tro malfrue; venontfoje skribu rekte al FEL kelkajn monatojn antaŭe.

ĉ) Marc Cuffez ricevis leteron de Edward Symoens pri bulgara instruisto,

kiu deziras restadi en nia lando de novembro 1995 ĝis januaro 1996. La estraro decidis, ke FEL ne apoguiton. Marc Cuffez respondos tiusence.

d) S-ro Akkermans (Nederlando), enveninta dum la parto "Diversaĵoj" de la estrarkunsido, skizas la historion kaj nunan situacion de Esperanto Nederland kaj ĝia revuo Fenomeno.

e) Elĉerpiĝis la broŝuro "Grenzenloos Kommunizieren". Alex Humet proponas, ke FEL subvenciu aŭ mem entreprenu reeldonon de ĝi. La eldono kostas po 10,- fr. por unu ekzemplero. Afero pridiskutota dum la sekvonta estrarkunsido.

8. Sekvontaj kunsidoj

Sekvonta estrarkunsido: 14.10.1995 je la 9.30a h. en la Esperanto-domo.
Sekvonta administrantarkunsido: 14.10.1995 je la 14.00a h. samloke.

Raportis Johan Van Eenoo.

* * *

Kunsido kun delegitoj de Esperanto Nederland, 95.09.16, 13.10-17.30 h.

Ĉeestis flanke de FEL: Ivo Durwael (prezidanto), Wim De Smet, Johan Van Eenoo, Marc Cuffez, Flory Witdoeck, Walter van den Kieboom, Jef Geraerts.

Ĉeestis flanke de EN: Ans Bakker-ten Hagen (prezidantino), Hans Bakker, W. Akkerman.

1. Ĝenerale

Ivo Durwael malfermas la kunsidon retroirante al antaŭaj kunsidoj en kiuj FEL kaj EN interkonsentis pri la eldono de komuna gazeto, 6 fojoj jare, ĉefe en Esperanto kaj laŭbezonaj nederlandlingvaj partetoj. Ans Bakker-ten Hagen substrekas, ke por EN tiu gazeto ne estu propagandcele, sed estu nur membrogazeto. Aperus do 6 membrogazetoj jare el kiuj la septembra-oktobra numero estu informgazeto.

La gazeto konsistus el EN-parto, FEL-parto kaj komuna parto kun lingva rubriko.

Ivo Durwael prezentas la ideon de FEL havi apartan redaktor(ar)on por la EN-parto, alian por la FEL-parto kaj trian por la komuna parto. Guido Van Damme, la nuna redaktoro de Horizontaal, estus teknika redaktoro de la gazeto. EN esploros la eblecojn por havi respondecan redaktoron en Nederlando.

2. Enhavo kaj nomo

Nombro de paĝoj: 16 + kvarpaĝa kovrilo. Do por ĉiu numero po 1,5 paĝoj por estraraj komunikoj EN, 1,5 paĝoj por estraraj komunikoj FEL, 2 paĝoj por lingvaj rubrikoj, 8 paĝoj por ĝeneralaj tekstoj.

Restos la rubriko "Overzicht" (komuna superrigardo pri la grupaj programoj) kun laŭalfabeta sinsekvo.

Pri nomo neniu jam pensis. Johan Van Eenoo proponas "La Simfonio" (la kuna sono).

3. Kostoj

Laŭ la ciferoj kiujn Ivo Durwael montras "Horizontaal" kostis maksimume 53.000 BEF por 700 ekzempleroj dum la pasintaj jaroj. Ni kalkulas, ke komuna gazeto kostus por FEL kaj EN kune 150.000 sen kaj 180.000 BEF kun afranko.

FEL preparolos la plibonigitan regularon pri membrogazeto dum sia administrantarkunsido de la unua de oktobro 1995.

Pri la abonprezo nenio ŝanĝiĝas: ĝi restas 600 BEF. La abono egalas al la kotizo.

4. Temposkemo

Ĉar la aperdatoj sekvas la kalendaran jaron la unua numero de la gazeto aperos je 01.01.1996. Guido Van Damme atendas la tekstojn ĝis 01.12.1995. Ĉefredaktoron ni do nepre havu antaŭ 01.11.1995 plejlaste. La kluboj sendu sian programon rekte al FEL antaŭ 01.12.1995.

Ivo Durwael atentigas, ke ĉe FEL estas kutimo sendi "Horizontaal" al la poŝto la antaŭlastan ĵaŭdon de la monato, kiu antaŭas la apermonaton. Ekzemple: la septembra numero sendatas al la poŝto la antaŭlastan ĵaŭdon de aŭgusto. Por la januara numero de 1996 de la komuna gazeto: 21.12.1995. Sufiĉe longe antaŭ la forsendado EN ĉiufoje sendos etikedaron al FEL; ĝis la lasta minuto korektoj eblas.

En la unua numero nepre aperu komuna teksto kun foto de la EN-prezidantino kaj la FEL-prezidanto, teksto kaj foto de la ĉefredaktoro.

La partoprenantoj al la nuna kunsido jam komencu pensi pri tekstoj por plifaciligi la laboron de la redaktoroj.

5. Ferme

La ĉeestantoj decidis festi la naskiĝon de la unua Esperanto-revuo flandra-nederlanda ne antaŭ ol ĝia unua numero estos atinginta la membrarojn, do ne antaŭ 31.12.1995.

Raportis Johan Van Eenoo.

* * *

Estraro, 95.10.21

Ĉeestas: Ivo Durwael (prezidanto), Marc Cuffez (vicsekretario), Jef Geraerts, Flory Witdoeck, Walter van den Kieboom, Henny De Ketelaere (alvenis je la 11a) (estraranoj).
Senkulpiĝas: Wim De Smet, Johan Van Eenoo.

La prezidanto malfermis la kunsidon je la 9.45a kaj bonvenigis ĉiujn. La raportoj estonte redaktiĝos en la nederlanda por okaze ebligi kontroladon de la ministerio.

1. Raporto de la kunsido de la 16a de septembro 1995

Ĉar la raporto de la antaŭa kunsido ankoraŭ ne estis disdonita, oni nun disponas pri tempo por legi la raporton. Poste venis la rimarkojn:

a) rilate al la estrarkunsido

Ĉeestis: ... Jef Geraerts

5.a) ... sed, inter alie dubas, ĉu s-ro Pirlot volas labori en la kadro de FEL, kaj sekve lasos al li labori kiel individuo. Ivo Durwael skribos ...

6. La FEL-estraro trovas tion interesa.

7. ... malrekta letero ...; ... merkatikisto ...

b) rilate al la kunsido kun Esperanto Nederland

2. kovrilo anstataŭ koverklo; 1,5 paĝoj ...

4. ... ĵaŭdon ...

2. Raporto de la kunsido en la "Vlaamse Culturele Koepel" (VCK) kun la respondeculoj de la "Dienst Volksontwikkeling" pri la apliko de la novaj dekretoj

* Ivo Durwael iris tien rilate al la kunlaboro kun Nederlando. En la VCK oni diris, ke ne eblas subvencii revuon kun Nederlando. Tial Ivo Durwael telefonis al Nederlando por anonci ĉi tiun negativan novaĵon. Horizontaal de restas sesfoje jare, grandparte en la nederlanda. Nederlando ekhavas novan revuon, sesfoje jare, en Esperanto. Kelkaj partoj estos komunaj, por limigi la kostojn: ekzemple samaj kovriloj.

* Ministro Martens volas revizii la dekretojn, sed ne la esencon, jes la sumojn antaŭviditajn por asocioj kaj institucioj.

En 1995, 1996, 1997 ni ricevos la saman subvencion kiel en 1994.

En 1997 oni decidis, ĉu ni estos rekonitaj aŭ ne. Se jes, tiam nia subvencio eventuale povas plialtiĝi ekde 1999.

* Dum plenigado de la subvencipetoj estas du specoj:

- edukaj horoj (kun pruvoj el gazetaro, afiŝoj, ...);
- kunlaboro kun aliaj organizaĵoj, apogo por kulturaj aktivecoj, ekzemple: prelegi en la "Davidsfonds"; iu, kiu dum unu horo petas klarigon (validas por 2 horoj minimume).

Sed devas esti aranĝoj por plenkreskuloj!

La duono de la petoj devas esti anoncitaj almenaŭ du semajnojn antaŭ la okazaĵo al Bruselo (sed tra la centro).

* Walter van den Kieboom diras, ke la Ŝtatsekretario Moreels volas komenci Konsilantaron pri Evolukunlaboro; ĉu ni ne povas kunlabori en ĝi? Ekzemple

nia agado "Skribilaro por Albanio".

Esperantistoj ne havas tradukproblemojn!

3. La estonteco de "Horizontaal"

Ivo Durwael formulas proponojn pri la redakcio de Horizontaal:

- Venos redakta komisiono, kiu okupos sin pri la formado de "Horizontaal". Tiu komisiono konsistiĝas el du aŭ tri personoj ekzemple elektitaj el la personoj, kiuj nun jam eldonas revuon en Flandrio.

- Kelkaj aliaj eroj, kiuj montriĝas:

- Ne estu kritikoj en "Horizontaal"!
- Informoj pri aktivecoj (en- kaj eksterlandaj), kalendaro kaj raportoj de personoj, kiuj partoprenis en io.

- Flory Witdoeckt proponas plusendi (monate?) kalendaron kun aktivecoj al la grupoj, kiuj siavice plusendos ĝin al la membroj. Tiu eventuale povus esti faksita.

4. Studotago en Loveno la 18an de novembro pri la strategio de FEL

Ĉi tiu studotago daŭras de la 10a ĝis la 17a kaj okazos en la centro de Loveno (ankaŭ atingebla per la publika transporto).

La ĉefa celo estas: aktualigi la strategion.

Marc Vanden Bempt preparos ĉion kaj poste informos. Kiuj aliĝas, ricevas libron kiel donacon de FEL!

Kiel prezidantoj dum tiu tago oni pensas pri: Patrick Haerick, Stefaan Cottenier aŭ Jorg De Mulder.

Nur invititoj estas bonvenaj kaj ĉi tiu studotago okazos en la nederlanda. Oni precipe pensas pri konordigado inter la Esperanto-centro, la grupoj, la estraro, ...

5. Propono de Jo Haazen pri koncerto en decembro

Ĉar decembro estas malbona tempo por koncertoj (tro okupita kalendaro), kaj la kostoj sufiĉe altiĝus, oni ne akceptas la proponon.

6. Diversaĵoj

* La apero de "Monato" malantaŭeniĝis kaj Paul Peeraerts apenaŭ povas ĝisdatigi la laboron. Estas bezono pri helpo por eviti trostreĉitecon. Sed finance FEL ne havas spacon. Tamen la estraro decidis, ke Paul Peeraerts povas serĉi redaktan sekretarion, se la elspezoj restas akcepteblaj. La estraro atendas konkretan taksadon de eventualaj plielspesoj.

* La "Dynamoprojekt" de Luc Van Den Bossche. Estas projekto en la lernejoj. Eble ni povos kunlabori en 1996.

* Agnes Geelen renkontis la prezidanton de la Albana Esperanto-Ligo. Ĝi petis donacon de FEL de ABC Gramatiko kaj ekzercaro. Ni decidis donaci la gramatikon.

* Jules Verstraeten dankas pro la festo de la 23a de septembro. Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts restas dum ankoraŭ unu jaro reprezentantoj de FEL en la "fondaĵo".

* 11-tagaro 2002: estas la demandaro kun aktivecoj por 1996. Ni ankoraŭ ne havas projektojn, ankaŭ ne por 2002, sed ni jes volas kunlabori en jam antaŭvidataj internaciaj projektoj. Ni devas ankaŭ instigi por lerni la "Internacian Lingvon".

* Nia ĉefministro Luc Van Den Brande dankas pro la alsendo de la rezolucio de la UK en Tampere (Finnlando). Li faras alvokon, por ke en Internaciaj Kongresoj niaj reprezentantoj parolu la nederlandan.

* 1996 estos la eŭropa jaro pri instruado kaj edukado.

* Marc Cuffez diras, ke li skribis al la Ministro pri Instruado kaj ricevis respondon. La ministro esploras, ĉu venos ankoraŭ lernejoj, kie Esperanto povas esti oficiale instruita, aŭ eble ekzamenon en Bruselo (la antaŭa "Middenjury").

* G. Pirlot ricevis respondon de F. Willockx kaj H. De Croo.

7. Venonta kunsido

Ĝi okazos je sabato la 2a de decembro ja la 9.30a en Antverpeno.

Raportis Marc Cuffez, tradukis Cor Willems.

* * *

Administrantaro, 95.10.21

Ĉeestis: Jules Verstraeten, Henny De Ketelaere, Ivo Durwael, Edward Kusters, Jacques Schram (Antverpeno); Wim De Smet (Kalmthout); Frans Croon (Lovenjo); Jef Geraerts, Jan Bovendeerd (Limburgo); Piet Glorieux (Kortrejko); Marc Cuffez, Flory Witdoeck, Walter van den Kieboom (Ostendo); Katje Lödör, Ingrid Lievens (Gento); Cor van Ekelenburg (Vertikale); Guido Van Damme (Horizontaal).

La prezidanto malfermis la kunvenon je la 14.30a kaj bonvenigis ĉiujn. La raportoj estos estonte redaktataj en la nederlanda por laŭokaze ebligi kontrolon de la ministra inspekto.

1. Raportoj pri la kunsidoj de la 11a de marto kaj de la 25a de junio

Piet Glorieux petas plian klarigon pri la projekto 50jara UN. Ivo Durwael respondas, ke jam venis negativa respondo telefone en julio kaj poste ankaŭ skribe en oktobro.

Ambaŭ raportoj estis aprobitaj.

5. Horizontaal

Pro la graveco de ĉi tiu ero, ĝi estis do pritraktita unua.

Flandrio havas Horizontaal, Nederlando havas Fenomeno, sed tiu ne plu ekzistos ekde la 1a de januaro 1996. Tial venis propono por starigi komunan revuon, en Esperanto. Ivo Durwael iris paroli kun la respondeculoj de la "Dienst Volksontwikkeling". El tio montriĝis, ke revuo en Esperanto ne estos akceptebla. Ankaŭ ĝi povas nur temi pri aferoj, kiuj okazas en Flandrio, ĝi devas esti flandra eldono. Nederlando estis informita pri ĉi tio. Nederlando startos novan revuon en Esperanto, presitan en Antverpeno. La lingvorubriko estus komuna, same kiel kelkaj tekstoj, kio ŝparas monon. La kovrilo povas validi por ambaŭ. Ankaŭ la kalendaro povas esti komuna.

Ivo Durwael havas proponon de regularo rilate al la redaktado de Horizontaal. La adaptita teksto estas aldonita.

2. Raporto pri la Ĝenerala BEF-Kunveno de la 14a oktobro 1995

Ĝi daŭris de la 14a ĝis la 19a h.

Malmulte decidiĝis dum ĉi tiu kunsido. Oni preparolis la estontecon de BEF kaj elektis estraron.

BEF ekzistas por la rilatoj kun UEA. Ĉirkaŭ januaro 1996 oni reekzamenos la strukturon (kunlaboro kun FEL, APE). Ankaŭ FEL preparolos tion kaj esperas havi rezulton fine de 1996.

3. Ĉu niaj grupoj estas en kongruo kun la regularo de FEL?

* Grupoj de FEL konsistu el minimume kvin personoj pli ol 15jaraj kaj devenantaj el tri malsamaj familioj. La estraro ekzistu el minimume tri personoj. La adreso troviĝu en Flandrio. Ili havu jare minimume kvar aktivecojn.

* Turnhout estas akceptita kiel nova grupo: Kampina Esperanto-Asocio.

* La sidejo de Lovenjo estu en Flandrio.

* Knokke ne plu estas membro de FEL.

* Beringen, Peer, Hasselt kaj Houthalen transdonu liston de estraranoj.

* Genk povas esti forstrekita kiel membro de FEL.

La listo de la grupoj aperos en Horizontaal.

La grupoj kun kiu FEL kunlaboras estas: FLEJA, Fervojistoj, Skolta Grupo el Tienen. Movado sen Nomo petis aliĝon.

4. Eventuala ŝanĝo de la punkto 6G de la Regularo pri la Administrantaro pri la ebla ĉeesto de membroj dum la estrarelektoj

Nun nur aliaj membroj povas ĉeesti, se ili estas invititaj. Venos ŝanĝo kaj tiel, ke aliaj membroj povas ĉeesti sed nur kun akcepto de la kunsido.

"La administrantarkunsidon povas ĉeesti aliaj personoj, sed nur post konsento de la prezidanto de la kunsido kaj kondiĉe ke ili ne ĝenu la kunsidon."

6. Novaj dekretoj rilate al la subvencioj

Ĉi tiuj dekretoj enhave ne plu ŝanĝiĝos por ni. Ni eventuale povos ricevi pli da subvencioj ekde 1999. La duono de la propraj aktivecoj devas estis anoncigitaj en Bruselo du semajnojn antaŭe (tra Antverpeno). Estas diversaj formularoj (propraj edukaj horoj, apogo, informdonado, ...)

Atentu: por ekspozicio oni havu minimume 20 vizitintajn grupojn.

La uzata lingvo de la aktivecoj estu la nederlanda.

Bezonas pruviloj: afiŝoj, anoncoj, gazetaraj artikoloj, ...

7. Diversaĵoj

* La 18an de novembro estos en Loveno studotago pri la strategio de FEL. Ĝi okazos en la Kultureel Centrum de la 10a h. ĝis la 17a h. Ĉiu, kiu aliĝas, ricevos libron. La studotago okazos en la nederlanda.

* Henny De Ketelaere proponas starigi telefonreton inter la grupoj de FEL.

* Semajno de la Internacia Amikeco: venonta administrantarkunsido.

* Biblioteko de Kortrejko: sekvenda.

* Kariljono: sekvenda.

Raportis Marc Cuffez, tradukis Cor Willems.

* * *

Administrantaro, 95.11.18, Cultureel Centrum Leuven

Ĉeestas: Ivo Durwael (prezidanto), Wim De Smet (vicprezidanto), Johan Van Eenoo (sekretario), Marc Cuffez (vicsekretario), Flory Witdoeck (kasisto), Jef Geraerts, Walter van den Kieboom (estraranoj);

Frans Croon, Edward Kusters, Piet Glorieux, Ghislain Jacobs, Gerd Jacques, Katja Lodor, Guido Van Damme (administrantoj).

Mandatoj: La sekvontaj administrantoj skribe transdonis siajn voĉdonrajton: Ingrid Lievens al Katja Lödör; Paul Peeraerts, Jules Verstraeten kaj Wim Slootmans al Ivo Durwael.

Entute estas 14 ĉeestantoj kaj 4 mandatoj, do 18 voĉdonrajtanoj.

1. Buĝeto 1996. Mankas la tempo por larĝe doni informojn. La prezidanto respondas la demandon de Piet Glorieux (kio signifas ero 648: dienstverlening) kaj la demando de Wim De Smet (precizaj sumoj en la ero "Vormingsprogramma"). Pliaj demandoj ne estis. La buĝeto 1996 aprobiĝis kun 17 voĉoj por, 0 kontraŭ kaj 1 sindeteno.

Vertikale verliest zijn betekenis als het niet regelmatig verschijnt en de meest actuele informatie bevat. Roro dringt nogmaals aan op een onmiddellijk verschijnen van een nr met alle niet gepubliceerde verslagen en een verschijning om de 2 maanden. Indien Cor van Ekelenburg daar niet in slaagt wil hij desgevallend de redactie overnemen.

10. Nieuwe structuur voor de VEB

Ivdu bezocht de plaatselijke clubs in Kalmthout, Antwerpen, Hasselt en Gent. Het voorstel om alle lidgelden te vervangen door vrijwillige schenkingen is niet uitvoerbaar om wettelijke redenen. Het vervangen van een deel van het lidgeld door een compensatie voor gepresteerde activiteiten wekte in elke groep weerstand op. Daarom ziet ivdu van dit voorstel af. Wat nog overblijft van de voorstellen is het volgende:

- een onderscheid tussen leden (600 fr lidgeld) en symphatisanten (we vragen een vrijwillige bijdrage)
 - vragers van informatie, cursisten en wie iets stort uit symphatie blijft 3 jaar gratis abonnee van Horizontaal; na elk signaal of storting wordt de datum voor 3 jaar opgeschoven (deze regel was vroeger van kracht gedurende één jaar, maar werd geannuleerd om financiële redenen - toch wordt hij terug ingevoerd en uitgebreid om te verhelpen dat cursisten en belangstellenden - zoals nu - een half jaar moeten wachten eer ze enig signaal krijgen van de VEB; zelfs als ze geen lid worden zijn ze toch potentiële esperantisten; hopelijk is dat het financieel houdbaar).
 - bij de inschrijving wordt gevraagd wie wil meewerken aan de informatie en verspreiding van Esperanto; op het lidmaatschapsformulier komen een aantal concrete suggesties.
 Het bestuur is met deze voorstellen akkoord, maar ze moeten nog bekrachtigd worden gedurende de ALGEMENE LEDENVERGADERING OP ZATERDAG, 14 SEPTEMBER E.K., om 14 uur in het Esperanto-centrum.

11. Noodkreet pape en Gerd Jacques

Flwd vraagt of er geen werk kan gedelegeerd worden naar plaatselijke clubs of opgelost kan worden door een "actiedag" in Antwerpen. De taken van pape blijken te ingewikkeld.

Er verschijnt een oproep om hulp in Horizontaal, in Monato en hopelijk weldra in Vertikale. Pape heeft al een eerste hulp gevonden: een beginnend secretaris voor Monato.

Gesuggereerd wordt om te onderzoeken of mensen op leerkontraat (vanaf nu mogelijk voor vzw's) of stagecontracten met scholen mogelijkheden zijn om het intikken van gegevens in de boekhouding te realiseren.

12. Knooppunt

De plannen voor een reorganisatie zijn in uitvoering. Vanaf 1 september zal er een inbelpunt zijn in elke provincie, wat heel wat kostenbesparend is.

13. Wereldcongres

Wim De Smet signaleert aan het bestuur dat de Vlaamse regering stimuleert om in 2002 een groot aantal internationale congressen te organiseren en deze extra wil subsidiëren. Hij stelt voor om te onderzoeken of een internationaal Esperantocongres of een wereldcongres mogelijk is.

14. Cursussen Quellinstraat

Sram stelde voor om de propaganda voor de officiële cursussen op de dagorde te plaatsen. Dit onderwerp is niet besproken, maar ivdu zal met de leraars van de Quellinstraat overleggen.

15. VOLGENDE BESTUURSVERGADERING: ZATERDAG, 14 SEPTEMBER E.K. OM 9.30

Verslaggever: ivdu

Fondaĵo Vanbiervliet, Kortrijk

Situacio fine de 1995

Antaŭ preskaŭ unu jaro mi ekinteresiĝis pri la sorto de la Fondaĵo Vanbiervliet. Jam aperis kelkaj raportoĵoj pri tio en la ĉi-jaraj Esperanto-gazetoj. Kiuĵ estas la ĝisnunaj konkludoj? Dum la pasintaj tri jaroj regule alvenis pliaj dokumentoj en la biblioteko, sed la skatoloj kaj kovertoj restis fermitaj. Rezulto estis plenplena, tute neuzebbla biblioteko, ne montrinda al eksteruloj. Cetere, el hazarde trovitaj informoj evidentiĝas, ke Ĉesar Vanbiervliet jam en 1989 atentigis pri la fakto ke la tasko iĝis tro peza por li; ni ŝajne ne aŭdis lin.

Dum la pasinta jaro unu aŭ du personoj dum unu aŭ du tagoj monate provizore ordigis la materialon. Kiam la bibliotekestro donos signalon por translokiĝo al alia ĉambro (jam plurfoje anoncita sed prokrastita; nepre necesa por forigi kelkajn nelogikaĵojn en la ordigo de la kolekto), tio eblos sen grandaj problemoj. Por via informo: temas pri 125 m da libroj, 100 m da revuojarkolektoj, 75 m da revuo-duoblaĵoj (malracie ordigitaj), aliaj kolektoj kaj multaj skatoloj kun neordigitaj esperantaĵoj.

La tempon bezonatan por ordigi la revuojn, rekomenci interŝanĝojn, kunmeti jarkolektojn, registri ĉion, mi taksas je tuttaga laboro de unu persono dum duona jaro. Tio ne inkluzivas la esploron kaj ordigon de pluraj skatoloj kun "diversaĵoj", nek enkomputiligon, nek la prizorgon de montrofenestro kaj de Esperanto-angulo en la publika parto de la biblioteko.

La Esperanto-bibliotekoj internacie

Tutmonde estas deko da bibliotekoj, kiuj laŭ amplekso estas kompareblaj kun Fondaĵo Vanbiervliet (strange: preskaŭ ĉiuj en EU!). Mi kelkfoje alskribis tiujn kies adreson mi havis; rezulto: Hispana Esperanto-Muzeo (HEM) reagis post kelkaj semajnoj, Aalen kaj UEA post kelkaj monatoj. Alia hispana biblioteko, "Ramon Molera Pedrals" - ĝis antaŭ kelkaj monatoj nekonata de mi - ankaŭ alskribis min. La aliaj ne donis vivosignon.

Uzo de komputila katalogo nepre necesas

Dum mia oktobra vizito al la HEM (la nura - krom Aalen - kun uzebla elektronika katalogo) mi plurfoje povis konstati, ke per komputilo eblas rapide trovi informojn, kiuj per papera sliparo tute ne aŭ nur post longa serĉado disponeblas. Dungitoj de la bibliotekoj de Kortrijk sugestis al mi la programon CDS-ISIS. Ĝi certe havas avantaĝojn: senpaga, tutmonde konata, uzebla per simplaj komputiloj. Mi bezonis iom da tempo por trovi aliajn uzantojn; evidentiĝis ke ili estas kiel esperantistoj: ĉieaj kaj konvinkitaj, sed izolitaj kaj malfacile troveblaj. CDS-ISIS ŝajnas estis tute nekonata nur en orienta Eŭropo kaj en la "riĉaj" aziaj landoj (Koreio, Japanio ...). Oni faris ĉinajn, arabajn, rusajn... versiojn de ĝi. CDS-ISIS do principe taŭgas por internacia uzo en Esperanto-bibliotekoj; ĝi eĉ pli taŭgas se esperantisto-programisto-bibliotekisto adaptus ĝin por niaj bezonoj (simila laboro antaŭ kvin jaroj okazis por pereinta Terminologia Centro de UEA - ĉu retrovebla/reuzebla?) Aliflanke, necesas aldoni, ke profesiaj programistoj, kiujn mi konsultis ne konas CDS-ISIS aŭ taksas ĝin neserioza.

La respondeculo de la HEM, s-ro Lluís Hernandez, principe konsentas pri uzo de ĝia programo en aliaj bibliotekoj. Ĝi estas la ĝis nun plej bona - kvankam s-ro Hernandez volonte konfesas, ke ĝi estas plibonigebla. Problemo por tutmonda uzo estas, ke tiu programo (verkita per dBase III+ kaj Clipper) estas speciale farita por HEM kaj ke adaptoj necesaj aliloke postulus la intervenon de la verkinto (aŭ de tre kompetenta alia programisto).

Kiel ekuzi komputilon?

La problemo pri kiu mi cerbumis dum la pasintaj monatoj estas: kiel eviti, ke ĉiu biblioteko, kiu ekuzas komputilon devas denove entajpi ĉion? Venis al mi jena ideo, esplorenda de pli kompetentaj movadanoj. Nuna amplekso de HEM-katalogo (revuoj kaj libroj) estas ĉ. 5 megabajtoj. Pli detala kaj pli kompleta registrado eble kvarobligos tiun amplekson. Tio signifas ke kompleta registrado de ĉiuj Esperanto-libroj kaj -revuoj postulos ĉ. 20 megabajtojn, modesta grandeco por nunaj komputiloj. Anstataŭ katalogo en ĉiu biblioteko, estu unu centra katalogo en kiu estu registrataj ĉiuj konataj eldonaĵoj. HEM- kaj Aalen-katalogoj povus esti bazo de tia datumbazo (transprenante la numeradon de HEM, kiu estas plej kompleta); la ideo estas realigebla en mallonga tempo post interkonsento pri uzota komputila programo. Al tiu centra katalogo oni iom post iom povas aldoni pli detalajn informojn, i.a. indikoj en kiu(j) biblioteko(j) iu verko troveblas.

Ne plu estus bezonataj katalogoj de la diversaj bibliotekoj; per unu ĝenerala, regule distribuata katalogo ĉiu ajn povas eltrovi ĉu kaj kie troveblas la bezonata informo. Detala komparo de ne ankoraŭ aŭtomatigita biblioteko kun centra katalogo povas - kun bona preparo kaj sufiĉe da volontuloj - okazi ene de kelkaj semajnoj/monatoj. Se ĝi sentas la bezonon, biblioteko povas havi etan kromkatalogon (uzantan la numeron de la centra katalogo) por informoj pri origino, lokigo, lokigo, pruntedono ...

Mi ne vidas bonan solvon por la daŭra ĝisdatigado de la centra katalogo. Jam nun teknike perfekte eblas ke biblioteko en urbo A. konsultas, kompletigas kaj adaptas centran datumbazon en urbo B. Verŝajne tio baldaŭ ankaŭ praktike kaj finance eblas. La ideoj de Martin Weichert (revuo Esperanto, decembro 1995) tute ne estas utopiaj. Tamen ŝajnas pli racie ne labori rektlinie (on line), sed per kopioj sur disketo aŭ CD-ROM. Tio ankaŭ ebligus daŭran uzon de ekzistanta programo de bibliotekoj kiuj preferas tion.

Ĉar por centra datumbazo estas specialaj postuloj (sekureco, fidindeco ...) eble tamen CDS-ISIS ne taŭgas; esplorenda afero. Ankaŭ estas la demando pri la loko de la datumbazo: iu Esperanto-centro estus ideala, sed UEA, FEL ... jam nun estas troŝarĝitaj. Aliflanke, privata prizorganto povas subite malaperi. Alia komplikaĵo: utilus, ke la elektota programo ankaŭ kapablas katalogi "esperantaĵojn", informojn pri planlingvoj kaj arĥivoj (mi pensas pri la preskaŭ forgesita, tamen ege grave arĥivo en franca Saint-Omer).

Tujaj planoj

Je la 21a de decembro s-ino Yvonne van den Hork vizitis la bibliotekon de Kortrijk kaj faris raporton pri ŝia vizito. Ĉar tiu raporto estis verkita en nederlanda lingvo kaj unualoke utila por Kortrijk, mi nur aldonas ĝin

por la belgaj kaj nederlandaj ricevantoj de ĉi tiu cirkulero. Mi tamen pretas traduki kaj postsendi ĝin se iu deziras.

Malrekte mi ricevis informon, ke UEA jam esploras la program-merkaton por sia Biblioteko Hodler. Mi antaŭvidas informon pri tio en la januara "Esperanto".

En Kortrijk restas farendaj pluraj taskoj (ordigo, ekzemple de duoblaĵoj de revuoj). Tamen, pro nuna nelogika ordigo ŝajnas preferinde prepari kaj laŭeble rapide fari la translokiĝon. Nur poste eblas racie labori. S-ino Monique Caestecker - diplomita bibliotekistino - pretas konsili.

Nova kunveno de la kunlaborantoj de la biblioteko de Kortrijk estas planita fine de januaro 1996. Bonvolu ĝis tiam havigi ideojn, sugestojn, raportojn pri realigoj ... al mi.

Roland ROTSAERT (95.12.25)

* * *

Raporto pri la vizito al la kortrijka biblioteko de Yvonne van den Hork

Donderdag 21 december heb ik een bezoek gebracht aan de collectie "Vanbiervliet Fonds" in Kortrijk, dit om een indruk te krijgen van de staat van de collectie en van de eventueel aanwezige catalogus, zodat er een beter oordeel gevormd zou kunnen worden over de noodzaak van automatisering.

COLLECTIE

Bij aankomst bleek dat de collectie goed verzorgd is en redelijk overzichtelijk op alfabetische wijze gerangschikt, zij het dat men er beter aan had gedaan om per kast alfabetische te rangschikken, i.p.v. over de gehele lengte van de stellingen. Maar die indeling zal waarschijnlijk gewijzigd worden met de aanstaande verhuizing in 1996. De tijdschriftencollectie is, voorzover ze compleet is, in verrassend goede staat, daar het overgrote deel ingebonden is, wat de levensduur zeer ten goede zal komen.

CATALOGUS

Er bleek ook een kaartencatalogus aanwezig, die echter na het overlijden van dhr. Vanbiervliet niet meer is bijgewerkt. De indeling van de kaartencatalogus lijkt nog meer rechttoerechtaan te zijn dan de collectie. Ook hier is zuiver op alfabetische volgorde van auteur gerangschikt. Tijdschriftnamen en auteurs staan door elkaar heen. Er is aan de kaartjes een volgnummer toegekend en de datum van inschrijving, zonder enige toevoeging van trefwoorden. Het zoeken van een boek op de titel, blijkt zodoende onmogelijk te zijn. Een ernstig manco, wat des te meer opvalt bij de sectie woordenboeken, die ook op auteursnaam staan gerangschikt.

FYSIEK TOEGANKELIJK MAKEN VAN DE COLLECTIE

Indien men de boekencollectie optimaal toegankelijk zou willen maken op korte termijn, is het gewenst om een (betere) rubrieksindeling te hanteren,

zodat de bezoeker ook zonder catalogus een keuze zal kunnen maken tussen, bijv. poëzie, romans, studieboeken op verschillend terrein, woordenboeken, enzovoorts, al naar gelang van de omvang van het deelterrein. Het snelst zal dat gaan, indien men de indeling van een reguliere openbare bibliotheek volgt, dus bijvoorbeeld een indeling op romans, poëzie, woordenboeken en studieboeken. Binnen de romans kan zo nodig een verdere onderverdeling naar onderwerp gemaakt worden. Voor de tijdschriften zou men desgewenst ook een indeling naar onderwerp kunnen maken.

TOEGANKELIJK MAKEN VAN DE (KAART)CATALOGUS

Een heel andere zaak is het toegankelijk maken van de catalogus. Allereerst is het beslist noodzakelijk om op meerdere gebieden te kunnen zoeken, dan nu het geval is. Niet alleen op auteursnaam, maar ook op titel (lieft op alle relevante woorden van een titel) en op onderwerp. Voor de tijdschriften geldt, dat er een ontsluiting zou moeten kunnen zijn op artikelniveau om van een dode, niet of nauwelijks geraadpleegde collectie, een levende voor wetenschappelijke doeleinden te gebruiken collectie te maken, zoals dat gebruikelijk is voor wetenschappelijke tijdschriften.

ANALYSE VAN BESTAANDE SYSTEMEN

Automatisering van de catalogus is daarvoor onontbeerlijk. Bij twee bestaande bibliotheeken, nl. die in Spanje en in Duitsland heeft automatisering plaatsgevonden.

De Duitse catalogus uit Aalen is gebaseerd op een lokaal bibliotheeksysteem, waarvan een proefexemplaar wordt aangeboden. In tegenstelling tot de Spaanse catalogus staan hier boeken en tijdschriften door elkaar. De catalogus is eenvoudig in het gebruik en visueel aantrekkelijk. Hier is niet alleen de catalogus, maar ook het menu en de hulpschermen in (ook typografisch correct) Esperanto geschreven. Voor de classificatie worden UDC-codes gebruikt. Deze numerieke codes zijn, ofschoon zeer geschikt als classificatiemethode, onduidelijk voor de leek. Hier is een handleiding zeker niet overbodig. Helaas staat een eenvoudig gebruik en visuele aantrekkelijkheid niet garant voor gebruiksvriendelijkheid. Het zoeken gebeurt op een wijze, die bekend is van Wordperfect: één voor één. Het opgeven van een veld is niet mogelijk, noch wordt aangegeven hoeveel records gevonden worden die aan de voorwaarde voldoen. Het combineren van zoekacties is helemaal onmogelijk. In hoeverre het proefexemplaar afwijkt van de uiteindelijke versie, m.n. voor wat betreft de zoekfaciliteiten, is niet duidelijk.

De Spaanse catalogus bestaat uit twee dBASE-files voor boeken en tijdschriften. De database bevat minder velden dan de Duitse en de trefwoord-aanduiding geschiedt op basis van afkortingen, waarvan de betekenis geraden zou kunnen worden, bijv. dat een ervan het land van uitgave is. Ronduit storend is dat de Esperanto-tekens ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ en ŭ op onconventionele wijze worden weergegeven, met een uitroepteken. Ook staan er diverse taalfouten (en/of tikfouten) in omdat de ontwerper het Esperanto niet (goed) machtig is. Net als bij het Duitse programma kan er slechts op één term gezocht worden. Daarentegen kan wel op meerdere velden gesorteerd worden. Op basis van de beschikbare gegevens zijn beide systemen verre van ideaal. In afwachting van de aankoop van een nieuw systeem, zou bijvoorbeeld gebruik gemaakt kunnen worden van de Spaanse dBASE-catalogus

om deze collectie alvast te ontsluiten.

EEN IDEEAAL SYSTEEM?

Het is duidelijk dat er in de toekomst gebruik gemaakt zal moeten worden van een ander automatiserings-systeem dat bij voorkeur:

- goede zoekfaciliteiten biedt
- typografisch correct Esperanto gebruikt voor:
 - . veldnamen en veldinhoud
 - . menu's en hulpschermen
- velden zonnodig kan herhalen, bijv. voor auteurs in de boeken- en tijdschriftartikelcatalogus en voor plaats van uitgave voor de tijdschriftcatalogus.

Als niet alleen aan automatisering van de Kortrijkse collectie gedacht wordt, maar aan een wereldwijde automatisering van Esperanto-collecties, kunnen de volgende eisen aan het systeem worden gesteld:

- eenvoudig te bedienen
- reeds in gebruik in meerdere landen
- meertalig, zodat er ook niet-Esperanto boeken in geplaatst kunnen worden, die dan zowel in die taal als in het Esperanto opvraagbaar zijn
- zo mogelijk niet alleen een losse catalogus, maar ook mogelijkheden tot uitleen en facturering
- mogelijkheid tot scannen van titelpagina's van boeken en tijdschriften

Wat die meertaligheid aangaat, dat wordt slechts door een gering aantal pakketten ondersteund. Sommige pakketten zijn er alleen in de Engelse of Nederlandse taal (handleiding en menu's). Wanneer de database aangepast kan worden voor een andere taal, is dit vaak alleen mogelijk voor talen binnen de standaard ASCII-set, dus West-Europese talen. Een gering aantal programma's accepteert andere code pagina's.

Op dit moment zijn de (meeste?) Esperanto-collecties 'dood'. Wil men deze tot leven brengen, dan is het handig om niet alleen een catalogus te hebben, maar een geïntegreerd systeem, waarmee de administratie kan worden gedaan. Hierbij kan ook gedacht worden aan een administratie voor de verkoop van boeken zoals bij UEA en FEL.

WELK SYSTEEM IS GESCHIKT?

Deze vraag is nu niet te beantwoorden omdat basisvoorwaarden zoals het systeem waarop het zou moeten draaien en het medium waarin het kan worden aangeboden niet bekend is. Desondanks doe ik een poging, met behulp van twee door de Nederlandse Vereniging van Gebruikers van Online Informatiesystemen uitgegeven testboekjes. (Microcomputerprogrammatuur voor documentatie en bibliotheek en Software voor bibliotheekautomatisering, beiden uit 1994). Indien men alleen een catalogus wil hebben, kan gekozen worden voor CDS/ISIS. Dit pakket is ontwikkeld door UNESCO en gratis beschikbaar gesteld voor niet-commerciële organisaties, zodat het wereldwijd een veel gebruikt pakket is. De catalogus biedt vele faciliteiten en is meertalig. Nadelen zijn dat slechts één ASCII-set wordt geaccepteerd en geen externe codepagina's. Bovendien is er buiten een gebruikersgroep, geen of weinig ondersteuning. Voorts is het tamelijk

ingewikkeld in het gebruik. Haar internationale gebruik en de melding dat aan het pakket t.a.v. gebruiksgemak wordt verbeterd, is een reden om dit pakket nader te bestuderen.

Andere pakketten die het overwegen waard zijn op basis van hun prestatie en acceptatie van externe ASCII-tekens, zijn bijv. Idealist, Headfast, Cardbox, Inmagic Plus, BRS/Search en bijv. FolioViews, een pakket dat volledige tekst ondersteunt. Binnen deze groep onderscheiden Idealist en Cardbox zich qua prijs (lager) en Inmagic Plus, BRS/Search en Folio Views omdat ze ook andere code pagina's accepteren. Dit laatste is echter niet van alle programma's bekend. Uit de testen is gebruiksgemak niet altijd op te maken. Afgezien van CDS/ISIS, leken alle hier besproken programma's vrij gunstig beoordeeld te zijn. Desondanks werd me, notabene door de leverancier van BRS/Search (IOTA Consultancy) gemeld, dat men dit systeem als te moeilijk ervaart, en overstapt op Cardbox for Windows. Hierbij wil ik alleen de kanttekening plaatsen dat gebruiksgemak voor een leek iets anders kan betekenen dan voor de professional (voldoende hulpschermen en menu's ten opzichte van snelheid). Als laatste wil ik vermelden dat van de hier genoemde programma's slechts Cardbox for Windows, FolioViews en Idealist in staat zijn om plaatjes op te slaan.

Wil men een compleet bibliotheekpakket aanschaffen, dan is dat uiteraard meteen veel duurder. Op basis van de testgegevens kan een ruwe selectie worden gemaakt. Indien men let op meertaligheid van het programma en de handleidingen en de mogelijkheid om met behoud van diacritische tekens te zoeken, springt met name Bibis er gunstig bovenuit. Ook qua mogelijkheden heeft het veel te bieden (het is o.a. multimediaal) voor een (in vergelijking met vergelijkbare pakketten), redelijke prijs. Daarentegen schijnt de installatie geen sinecure te zijn. Voor dit pakket schijnt echter minder systeembeheer te vergen dan andere programma's, zoals bijv. BRS/Search!

Yvonne VAN DER HORK, Wageningen

* * *

Kelkaj novaj informoj pri E-bibliotekoj (Martin Weichert, 3 julio 96)

1. Internacia Esperanto-Muzeo Vieno kun komputilreta librokatalogo!

Mi ricevis ĝojigan leteron de mag. Herbert Mayer en Vieno, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM). Li skribas:

"La IEM estas parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj en sia katalogiga sistemo strikte ligita al la ĉi-rilataj normoj. Tio signifas, ke ekde 1990 ni katalogigas ĉiujn librojn rekte en la bibliotekara komputila reto. Pro tio vi povas konsulti niajn havaĵojn, se vi havas konekton al la Aŭstria "Verbund" - tion ja havas multaj universitataj bibliotekoj en Eŭropo. Krome pere de Interreto (Internet) oni havas mondscale rektan aliron. Krome ni iom post iom faras la retrorigardan katalogigon, tiel ke iam nia kompleta havaĵo estos konsultebla per komputilo."

Bonege! La aliro al la katalogo eblas per la TTT-adreso:
<http://bibgate.univie.ac.at/>

Pli da informoj troveblas ĉe: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/iemw/>

Mi trovis proks. 1400 E-librojn en tiu katalogo. Laŭ informo de mag. Mayer, IEM havos Internet-konekton post kelkaj monatoj.

2. Informpaĝoj pri E-bibliotekoj en TTT

Pluraj novaj informpaĝoj pri Esperanto-bibliotekoj estas nun alireblaj per TTT (Tut-Tera Teksaĵo, angle WWW, World-Wide Web).

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/>

La plej gravaj Esperanto-bibliotekoj. Ilia amplekso, stato de katalogado, komputila/reta aliro. Hiperligoj al librokatalogoj kaj bibliografioj en la reto.

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aalen/>

Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Ĝeneralaj informoj, trilingva enkonduko. Ĝia kompleta librokatalogo (9000 titoloj) kun plenteksta serĉebleco.

<http://machno.hbi-stuttgart.de/~sf/esperanto/espkat/suchen.html>

Serĉebleco de la sama katalogo ĉe Stefan Fiesahn.

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/iemw/>

Internacia Esperanto-Muzeo Vieno. Neoficiala "hejmpaĝo". Serĉebleco tra (ĝis nun) ĉ. 1400 titoloj.

Kelkaj pliaj librolist(et)oj troveblas en miaj TTT-paĝoj, i.a.:

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/gotlib/>

E-libroj en la Gotenburga urba biblioteko (500 titoloj).

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/oo.html>

La "Serio Oriento - Okcidento".

TTT-paĝojn oni povas ankaŭ ricevi per nura retpoŝto. Por ricevi unu el la menciitaj paĝoj, oni sendu al la adreso <w3mail@gmd.de> mesaĝon kun "get" kaj la TTT-adreso, ekz-e:

To: w3mail@gmd.de
get <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/>

La paĝo ordinare alvenos jam post kelkaj momentoj.

3. Prelego "Esperanto-bibliotekoj en la moderna epoko"

En aprilo mi havis okazon vojaĝi al Britio, kaj interalie viziti Londonon kun ĝia E-klubo kaj la sidejo de B.E.A. Precipe mi ĝojis viziti la Bibliotekon Butler kaj renkontiĝi kun ĝia bibliotekisto Geoffrey King. La Biblioteko Butler havas plurmil librojn, kaj grandan nombron de periodaĵoj kaj de aliaj kolektindaj "eroj", inkl. varbfolioj, broŝuroj, manuskriptoj k.a. Kvankam

estas apenaŭ eble doni eĉ malprecizan takson de la nombro de la libroj, ili estas bone alireblaj (troveblaj) per sliparaj katalogoj. Ĉ. 2000 libroj (duoblaĵoj) estas prunteblaj; el tiuj ĉ. la duono estas komputile registrita.

Miajn freŝajn sciojn pri Biblioteko Butler mi povis tuj uzi en preleigo prezentita al la londona E-klubo prelegon kun la temo "Esperanto en la moderna epoko". Mi informis pri la stato de diversaj E-bibliotekoj en la mondo kaj instigis al pli bona subteno kaj al (pli da) apliko de komputiloj por katalogado, serĉado kaj interŝanĝo ("Projekto Tutmonda E-Biblioteko"). La preleigo vekis viglan intereson kaj diskuton ĉe la dudeko da aŭskultantoj. La sekvan semajnon mi povis prelegi ankoraŭfoje en Kembriĝo pri la sama temo, kaj denove unu monaton poste ĉe la Germana E-Kongreso en Aŭgsburgo (kio bedaŭrinde ne estis anoncita, ĉar la okazo nur venis tre subite).

4. Aalen: Regularo por la enkomputiligo

Kiam mi siatempe laboris pri la datumaro de la Germana E-Biblioteko (nun en Aalen), mi devis elpensi strukturon por la datumaro, kaj sekve regulojn por la enkomputiligo. Tiuj reguloj estas implicite videblaj en la ekzistantaj datumoj. Laŭ peto de Utho Maier de la E-grupo en Aalen, mi intertempe surpaperigis kelkajn eksplicitajn gvidliniojn por la enkomputiligo, laŭ kiuj mi aranĝis la datumaron. Bibliografia priskribo en la datumaro havas jenajn kampojn:

AUT: aŭtoro
 TIT: titolo
 SUB: subtitolo
 KON: kontribuantoj
 LOK: eldonloko
 ELD: eldonis
 JAR: eldonjaro
 PĜ: amplekso (nombro de paĝoj)
 FMT: formato (en centimetroj)
 SER: serio
 VOL: volumo (numero en serio)
 ISB: ISBN, internacia norma libro-numero
 KLA: klasifo laŭ Universala Dekuma Klasifo (UDK)

La reguloj indikas kion oni skribu kaj kion oni ne skribu en tiujn kampojn. (Fakte ekzistas kelkaj pliaj kampoj kiuj estas uzataj en Aalen, sed tiujn ne traktas tiuj ĉi reguloj.)

La "Reguloj por la Komputila Registrado" (en malneta versio) ekzistas kiel PostScript-dosiero, trovebla per FTP ĉe FTP-ejo: ftp.cs.chalmers.se
 dosierujo: /pub/users/martinw/esperanto/aalen/
 dosiero: regular.ps
 TTT-adreso: http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aalen/regular.ps

5. CDS/ISIS - ĉu ŝanco por E-bibliotekoj?

Ni diskutis en kelkaj antaŭaj leteroj pri la ebla taŭgeco aŭ netaŭgeco de CDS/ISIS por E-bibliotekoj. Dank-al Stefan Fisahn mi povis nun iom pli bone informiĝi pri CDS/ISIS. Stefan laboras ĉe "Hochschule für Bibliotheks- und Informationswesen" (Altlernejo por Bibliotekado kaj Informado) en Stuttgart; li estas spertulo pri CDS/ISIS kaj estas (freŝa) esperantisto.

Diversaj informoj pri CDS/ISIS troveblas en la reto, ekzemple:

<http://ux4sns.sns.it/isis/root.html>

"home page of the CDS/ISIS Today located in Pisa, Italy"

<http://www.uni-stuttgart.de/UNIuser/hbi/publikat/diplarbe/schiefer.j/cds-isis.s.htm>

germanlingva TTT-informpaĝo pri CDS/ISIS de Jutta Schiefe

<http://machno.hbi-stuttgart.de/~sf/isis.html>

germanlingva TTT-informpaĝo pri CDS/ISIS de Stefan Fisahn

Krome ekzistas almenaŭ unu retroŝta dissendolisto pri CDS/ISIS por aktualaj informoj kaj helpo ĉe problemoj.

Leginte pli da informoj pri CDS/ISIS, mi havas la impreson ke ĝi povus esti bona ŝanco por Esperanto-bibliotekoj. Mi povas imagi ke ni agu jene:

. Ni rekomendos al Esperanto-bibliotekoj uzi CDS/ISIS. Ĝi kostas malmulte (nur simbolan prezon, ekz-e 25 gmk.), kaj ĝi funkcias bone per malsamaj komputiloj, multekostaj aŭ malmultekostaj, ekz-e per IBM-kongrua PC kun 286-procesoro, aŭ per Windows, aŭ per Unix, ekz-e Linux. Oni do ne devas aĉeti multekostan komputilon por uzi CDS/ISIS.

. Ni esperantigu la fasadon de CDS/ISIS. CDS/ISIS estas farita speciale por tia alilingvigo. Stefan Fisahn jam laboras pri la traduko.

. Ni traduku la Aalen-an datumaron al CDS/ISIS-formo. Stefan jam faris tion.

. Ĉiu E-biblioteko kiu volas partopreni (supozeble Hodler en Rotterdam, Vanbiervliet en Kortrijk, Gjivoje en Zagreb?, eventuale Aalen mem?, Butler en Londono?, SEF en Stokholmo?) povas ricevi la esperantigitan programon kaj povas ricevi la jam enkomputiligitajn datumarojn de Aalen (kaj de aliaj bibliotekoj) kaj per tio komenci enkomputiligi la proprajn kolektojn.

. Surbaze de CDS/ISIS, oni povos konsultebligi la datumarojn en la reto per servoj kiel TTT, WAIS, aŭ telnet ("OPAC").

Kun tiuj bibliotekoj kiuj uzas alian datumbazan programon ol CDS/ISIS (ekz-e dBase, Oracle, LARS), oni laŭeble interkonsentu iun datumformon por interŝanĝo kiu de ambaŭ flankoj estu import- kaj eksportebla.

6. "Projekto Tutmonda E-Biblioteko"

Antaŭ kelkaj monatoj mi dissendis la tekston "Projekto Tutmonda Esperanto-Biblioteko: Kvincentcent Esperanto-libroj en vian hejmon!" Intertempe ĝi ankaŭ aperis en n-ro 102 de Eventoj. Jen venis reago de Roland Rotsaert, kiu malkonsentas kun mia "opinio ke estas bezonata mono. Hispana E-Muzeo kaj Fondaĵo Vanbiervliet estis komplete faritaj per volontula laboro."

Nu, mi eble estis tro pesimisma rilate la monon. Ja la programo CDS/ISIS estas (preskaŭ) senkosta, kaj se ni sukcesas trovi (motivigi) volontulojn por libervola laboro, tiam la tuto vere ne bezonas multon kosti. Do, mi

esperas ke baldaŭ ni vidos la katalogon de Biblioteko Hodler sur komputila disketo!

 Martin Weichert, Chalmers, Inst. f. Datavetenskap, S-412 96 Göteborg
 <martinw@cs.chalmers.se>. Tel: +46-31-772 10 68. Fax: +46-31-16 56 55

* * *

Fondaĵo Vanbiervliet (FV) en Kortrijk: konkludoj post unu jaro

Sur la antaŭaj paĝoj vi legis malnovajn kaj novajn informojn pri la diversaj bibliotekoj en Esperantujo. Hodiaŭ (mia jam tradicia "unua ĵaŭdo de la monato") mi estis en Kortrijk. Retrorigardante, mi pensas ke en unu jaro mi sukcesis realigi du aferojn: kelkaj E-bibliotekoj vekiĝis kaj ekpensas pri modernaj laborometodoj, kaj FV aspektas iomete ordigita (unuavide, profesia bibliotekisto certe verkus dikan raporton pri ĉiuj mankoj kaj eraroj).

La laboro en FV estas multe pli temporaba ol mi antaŭvidis. Ankoraŭ nun mi regule malkovras ordigotan materialon. La bezonataj helpantoj ne aperis. En la notlibro kie la volontuloj registras la faritajn laborojn mi preskaŭ nur vidas mian manskribon; enskriboj de kortrijkanoj tute mankas. En la publika parto de la biblioteko estas montrofenestro kaj breto je dispono por konigi la FV. Mi ne prizorgis tion, havante pli urĝajn taskojn kaj pensante ke tian etan laboron okaze povas fari lokulo. Ne okazis. Alvoko tra 'Platform voor Voluntariaat' ne donis rezulton. Eblas ripeti tiun alvokon, sed ĉu havas sencon se evidente neniu kortrijkano disponeblas por 'gvidi' nove trovitan helpanton ?

Komence mi iom larĝe dissendis - proprakoste en propratempo - cirkulerojn pri la situacio. Post kelkaj monatoj mi rezignis pri tio kaj sendis la informojn nur al la redaktoro de Vertikale; la celo de tiu revuo ja estas informi la aktivan FEL-membrojn. Mi ne antaŭvidis daŭran ne-aperon de Vertikale. Nun la informo jes aperis kaj espereble anoncos sin helpantoj. Mi promesis labori unu tagon monate kaj mi faros tion almenaŭ ĝis la fino de 1996. (Cetere, unu labortago en la biblioteko postulas plian tagon hejme por korespondado ktp.) Mi estis preta komenci la laboron, sed mi jam nun anoncas ke mi ne daŭrigos. Se ne venas pluraj aliaj personoj, la FV ekde 1997 denove estos fermita. Por ĉiam ?

Kio restas fareda ?

Komence mi malplenigis la dekojn da skatoloj, sako kaj kovertoj kaj ordigis laŭ tri kategorioj: revuoj, libroj kaj diversaĵoj. Nun deko da skatoloj kun diversaĵoj atendas prilaboron: enestas foje valora, foje malvalora materialo: dokumentoj pri aliaj planlingvoj, turismaj prospektoj, arĥivoj de E-grupoj... La libroj estis relative malmultnombraj kaj mi simple (re)metis ilin sur la bretoj. Plejparton de la tempo mi dediĉis al revuoj. Estas minimume 100 'vivantaj' kolektoj, al kiu ĉiumonate aldoniĝas numero. La ordigado laŭ titolo preskaŭ finiĝis (sed daŭre alvenas nova materialo). Nun la revuoj estu ordigataj laŭnumere, estu preparataj kompletaj jarkolektoj por bindado, la troaj duoblaĵoj estu forigataj, rekomencu sistema korespondado kun aliaj bibliotekoj por interŝanĝi numerojn...

Pro plurjara neglekto, pro nekono de la sistemo uzata de miaj antaŭuloj, pro translokiĝo kiu ne okazis en bonaj cirkonstancoj... la alfabeto ordigo iĝis nefidinda. Necesas skrupule kontroli tion (ĉ. 20.000 libroj kaj jarkolektoj).

Mi taksas ke la menciitaj taskoj postulos ekvivalenton de unu homjaro, dividota inter pluraj volontuloj.

Nur post tio eblas plani faradon de elektronika katalogo, nepre necesa por ekspluati la riĉaĵojn de la kolekto. (La papera katalogo jam de minimume 4 jaroj ne plu estas ĝisdatigita; mi opinias ke estas preferinde komplete rekomenci la katalogadon.) La urba biblioteko mem sugestis CDS-ISIS; ĝi certe taŭgas kaj eĉ pli taŭgas se aliaj E-bibliotekoj uzus ĝin. Aliloke en ĉi tiu revuo troviĝas informo pri CDS-ISIS-kurso. Por eviti re-entajpadon de ĉiuj informoj principe estas la elektronikaj katalogoj de hispana kaj germana E-bibliotekoj je dispono. Ideale estus centra katalogo de ĉiuj E-bibliotekoj (komparebla kun sistemo uzata en plejparto de la flandraj publikaj bibliotekoj), en kiu slipo de libro aŭ revuo estas farata nur unu fojon, nome de la biblioteko kiu unue ricevas ĝin, kaj se eble surbaze de informoj jam antaŭ apero liveritaj de la eldonisto. Nun tiu ideo ankoraŭ estas iom fantazia, sed interreto tiel rapide evoluas ke post unu jaro ĝi verŝajne estos memkomprenebla. Mi taksas ke farado de la katalogo ankaŭ postulos unu homjaron (malpli se la teknikaj evoluoj estas favoraj).

La volontuloj plejofte ne havos bibliotekan trejnadon. Monique Caestecker pretas regule konsili (kaj disponigi komputilon). Certe ankaŭ la dungitoj de la urba biblioteko de Kortrijk pretas transdoni siajn sciojn.

Roland ROTSAERT (96.08.01)

[anonco Workshop converteren naar CDS/ISIS]

Interreto - Tuttera TeksaĵoFEL kaj Knooppunt kune sur la inform-ŝoseo?

Jam de kelkaj jaroj FEL uzas retpoŝton (angle: E-mail). Komence estis pli malpli eksperimente, sed rapide evidentiĝis, ke tiu poŝtsistemo tre utilis por Monato, por la libroservo, por solvi komputilajn problemojn, ktp. Ankaŭ tra tiu kanalo malkovriĝis aro da aktivaj esperantistoj nekonataj en la kutimaj movadaj rondoj.

Post esploro de eblaj liverantoj de retpoŝtservoj, evidentiĝis, ke la genta asocio "Knooppunt" liveras bonan servon je favora prezo. Cetere, Knooppunt estas kvazaŭ fratina asocio de FEL, ĉar pere de Netwerk Vlaanderen ĝi ankaŭ ricevas parton de sia rimedoj el "Krekelsparen".

Evoluoj en elektronikaj medioj estas ege rapidaj kaj krom retpoŝto nur ankaŭ iĝis ofte priparolata TTT (tuttera teksaĵo, angle WWW, Word Wide Web). Ankaŭ tiun novan eblon FEL jam antaŭ kelkaj monatoj ekuzis (per sia t.n. hejmpaĝo) kaj denove oni konstatis, ke per ĝi kontakteblas personoj ĝis nun nekonataj.

Malgraŭ la abunda informado pri TTT en la amaskomunikiloj, en la realo ĝis nun nur uzas ĝin fanatikuloj kaj personoj, kiuj tra laborejo aŭ universitato havas senpagan aŭ malmultekostan aliron al ĝi. Tamen mi antaŭvidas, ke - i.a. pro instigo de la registaro, pensu pri Telenet Vlaanderen - TTT-aliro por multaj familioj iĝos ĉiutaga informilo kaj amuzilo, kiel nun jam estas en Usono.

Jen, post longa enkonduko, mia propono. Ke retpoŝto kaj TTT en Esperantujo jam ekzistas, ĉiu povas konstati legante la Esperanto-gazetaron. Baldaŭ plejparto de la aktivaj Esperanto-grupoj ankaŭ sentos bezonon je ĝi. Ĉu ne estus interese, ke laŭeble multaj elektu la liveranton, kun kiu jam laboras FEL, nome Knooppunt? Se troveblus deko da grupoj, administrantoj kaj estraranoj, kiuj pretas aliĝi al Knooppunt, ĉiuj povus profiti de favora grupa tarifo. Trejnado por uzi la reton povus okazi komune, intergrupa kaj internacia komunikado estus pli rapida, eĉ nia prestiĝo ĉe la flandra registaro kreskus ... Certe en ĉiu grupo estas almenaŭ unu interesito, kiu interesiĝas pri uzo de retpoŝto kaj TTT kaj nur bezonas etan puŝon en la bona direkto!

Roland ROTSAERT (majo 1996)

* * *

FEL kaj Knooppunt kunlaboros pri Interreto

La asocio Knooppunt v.z.w. faris kun FEL interkonsenton pri kunlaborado. Unu el la tujaj praktikaj sekvoj estas, ke kunlaborantoj de FEL (estrararoj, administrantoj, respondeculoj de lokaj grupoj, ktp.) sed ankaŭ individuaj membroj, povas konektiĝi al Interreto kontraŭ rabatita tarifo.

Kion fari? Se vi deziras konektiĝi al Interreto, ĉu nur por povi uzi elektronikan poŝton, ĉu por povi konsulti la milionojn da informpaĝoj en la Tuttera Teksaĵo, skribu aŭ telefonu al FEL.

Kion vi bezonas? La bazaj bezonoj estas: komputilo, modemo kaj telefonkonek-

to. Pliajn informojn vi povas legi en la broŝuro "Interreto. Inter kio?", kiu estas havebla ĉe FEL kontraŭ nur 90 fr. + afranko. Krome Knooppunt iom post iom eldonos manlibrojn en Esperanto.

Kiom kostas? La baza tarifo estas 98 fr./horo (inkluzive de AVI), kun minimumo de 490 fr. monate. Al tio aldoniĝos unufoja konektokosto, kiu dependas de via komputila sistemo, de la fakto ĉu vi mem instalos la programaron, aŭ ĉu FEL aŭ Knooppunt faru tion por vi.

Kiel pagi? Ordinaraĵoj ricevos de FEL fakturon. Por respondeculoj de grupoj povas esti farita aparta interkonsento.

Paul PEERAERTS (aŭgusto 1996)

Tajpi Esperante? Ĉapelilo!

Estis iam tempo, kiam tajpado de Esperanto ne estis facila. Plej ofte oni garnis tajpitan tekston per ne tro belaj mane aldonitaj supersignoj. Tiu tempo feliĉe pasis. Antaŭ nelonge la germana firmao Professional Consulting ellaboris tekstprilaboran programon plene en Esperanto. La programo tamen ne nur estas en Esperanto, sed ĝi estas verkita tute por Esperanto. Konkrete ĝi donas la jenajn avantaĝojn:

- 70 diversaj Esperantotiparoj;
- facila tajpado de la supersignitaj literoj per la regklavo;
- la programo avertas vin pri viaj tajperaroj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj;
- ĉe la fino de linio, la programo aŭtomate disigas vortojn laŭ la establitaj kutimoj en Esperanto.

Krom tiuj tipe esperantaj avantaĝoj, Ĉapelilo kompreneble disponas pri la bazaj kapabloj de tekstprilabora programo: rektigo, centrado, dikigo, kursivigo, grandigo kaj malgrandigo, enpaĝigo, ktp. ktp.

Ĉapelilo estas havebla por la mastrumaj sistemoj Windows 3.1, 3.11 kaj 95. Ĝia prezo estas 5130 BEF + afranko. Al la pakaĵo apartenas klara manlibro en Esperanto. Mendu Ĉapelilon ĉe FEL.

PP

Kiu baldaŭ vojaĝos al Brazilo ?

Je 26-28 septembro en Regiona Tribunalo pri Laborjustico en Piracicaba (SP) okazos 4a brazila kaj la internacia Kongreso pri Kamplabora Justico. Samtempe okazos E-ekspozicio kaj estus interese se persono (se eble juristo) kiu en tiu periodo estas en la regiono povus deĵori en la ekspozicio. Kontaktpersono: Juscelino Gama, Unicamp E-Grupo (espero@ime.UNICAMP.br)

REAGE

[Praktijksesse pojectmatig werken Leuven 1]

(al la artikolo de Jacques schram en Vertikale 11)

Kara Jacques,

En la menciita artikolo vi esprimas vian malŝaton por politikistoj kaj pledas por ne plu bazari per Esperanto ĉe homoj malfidindaj.

Mi ne volas debati pri la fakto, ĉu ĉiuj politikistoj ĉiam estas malfidindaj. Mi nur mencias faktojn el mia praktikaj spertoj.

Kiam Jo Haazen sukcesis startigi oficialajn Esperanto-kursojn en la urbo Antwerpen, tio estas finfine pro decido de la tiama skabenino Mathilde Schroeyens. Se poste establiĝis la "Vintraj Cikloj", kun subvencio por la vojaĝoj de dekoj da eksterlandaj prelegantoj, tio estis politika decido de la tiama Ministro pri Kulturo Rika de Backer. Kiam la administracio neatendite kvaronigis la kutimajn subvenciojn, la persona interveno de s-ino de Backer savis nin pro ŝia decido, ke ni ricevu tri kvaronojn de la elspezoj. Post la malapero de s-ino de Backer al la Eŭropa Parlamento kaj la emeritiĝo de Esperanto-favora oficisto, ni definitive perdis eblecon por akiri subvencion de la Dienst voor Internationale Culturele Betrekkingen. Kial la administracio entuziasmis pri niaj projektoj okaze de UN-50-jara kaj la konsilantaro malfavore prijuĝis ilin? Ni povas konjekti mankon de politika subteno.

Kiam la Ministro pri Kulturo estis favora al Esperanto, ni sukcesis sendi belgan reprezentanton al la UK je kostoj de la belga ŝtato. Plej ofte tiuj reprezentantoj redonacas la ricevitan kompenson al BEF aŭ FEL.

Tiuj faktoj ne signifas, ke ni bazaras aŭ vendas nian idealon pri pli bona internacia komunikado. Filozofoj inspiru nin por levi la enhavan nivelon de nia movado. Sed neniu filozofo povus havigi al ni la supre menciitajn eblecojn. Politikistojn ni ankaŭ bezonas ĉar nur ili povas decidi pri la havigo de praktikaj rimedoj por nia agado.

Ivo DURWAEEL

Eŭropa Volontula Servo

La Eŭropa Komisiono (laŭ propono de komisionano Edith Cresson) aprobis provprojekton, per kiu 2.500 junuloj 18-25-jaraĝaj povos plenumi socie utilajn taskojn en alia EU-lando. Ili ricevos trejnadon, kompenson por vojaĝ-kaj restadkostoj kaj poŝmonon. Eksciinte pri la projekto, mi tuj pensis pri la E-bibliotekoj (unu el la eblaj projektoj estas 'protekto de kulturaj valoroj', aŭ io simila), sed ŝajnas ke rilatas unualoke al arkitekturo. En novembro 1996 la Komisiono proponos plurjaran projekton, per kiu dekmiloj da eŭropaj junuloj ĉiujare povos volontuli. Eble troveblas eŭropaj parlamentanoj kiu pretas interveni por ke la projekto ankaŭ uzeblas favore al Esperanto ?

RR

Vertikale 13

59

60

Vertikale 13

[Leuven 2]

[Leuven 3]

MANIFEST VAN PRAAGVAN DE BEWEGING VAN DE INTERNATIONALE TAAL ESPERANTO

Wij, leden van de wereldwijde beweging ter bevordering van Esperanto, richten dit manifest aan alle regeringen, internationale organisaties en mensen van goede wil; verklaren onze intentie om met vaste wil verder te werken aan de volgende doelen en nodigen elke organisatie en iedere persoon afzonderlijk uit zich hierbij aan te sluiten.

In 1887 gelanceerd als project voor een hulptaal ten behoeve van internationale communicatie en snel geëvolueerd tot een levende taal vol nuances, functioneert Esperanto al meer dan een eeuw om mensen over grenzen van taal en cultuur heen te verbinden. Ondertussen hebben de doeleinden van zijn sprekers niet aan belang en actualiteit ingeboet. Waarschijnlijk zullen noch het wereldwijde gebruik van enkele nationale talen, noch de vorderingen in de communicatietechniek, noch het ontdekken van nieuwe methoden van taalonderricht de volgende principes verwezenlijken, die wij essentieel achten voor een rechtvaardig en doeltreffend taalgebruik.

1. DEMOCRATIE

Een communicatiesysteem dat bepaalde mensen voor het leven bevoorrecht, maar dat van anderen eist, dat ze er jarenlang energie in investeren om een minder hoog niveau van taalbeheersing te bereiken, is fundamenteel ondemocratisch. Hoewel Esperanto, zoals elke taal, niet volmaakt is, overtreft het elke rivaal in hoge mate wat betreft een gelijkwaardige, wereldwijde communicatie. Wij beweren dat taalongelijkheid, communicatie-ongelijkheid op alle niveau's tot gevolg heeft, inclusief op internationaal niveau. Wij vormen een beweging voor democratische communicatie.

2. TRANSNATIONAAL

Elke nationale taal is gebonden aan een bepaalde cultuur en een bepaald volk of land. De leerling, bijvoorbeeld, die Engels leert, leert ook over de cultuur, de geografie en politiek van Engelstalige landen, voornamelijk de Verenigde Staten en Groot-Brittannië. De leerling, die Esperanto leert, leert over een wereld zonder grenzen, waarin elk land als thuis wordt gepresenteerd. Wij beweren, dat het onderricht in een nationale taal gebonden is aan een bepaald wereldbeeld. Wij vormen een beweging voor transnationaal onderricht.

3. PEDAGOGISCHE EFFECTIVITEIT

Slechts een klein percentage van degenen, die een vreemde taal leren, leren die echt beheersen. Volledige beheersing van Esperanto is zelfs mogelijk via zelfstudie. Verschillende onderzoeken hebben laten zien, dat het leren van Esperanto een propaedeutisch effect heeft op het leren van andere talen. Men beveelt Esperanto ook aan als centraal onderdeel in cursussen, die leerlingen ervan bewustmaken wat taal is. Wij beweren, dat de moeilijkheid van nationale talen altijd een belemmering vormt voor veel leerlingen, die toch voordeel zouden hebben van een tweede taal. Wij vormen een beweging voor doeltreffend taalonderricht.

4. MEERTALIGHEID

De Esperanto-gemeenschap is één van de weinige taalgemeenschappen op wereldschaal, waarvan de sprekers zonder uitzondering twee- of meertalig zijn. Elk lid heeft de taak op zich genomen ten minste één vreemde taal te leren tot op spreekniveau. In veel gevallen leidt dat tot de kennis van en de liefde voor meerdere talen en over het algemeen tot een bredere persoonlijke horizon. Wij beweren, dat de sprekers van alle talen, grote en kleine, zouden moeten beschikken over de reële kans zich een tweede taal eigen te maken tot op spreekniveau. Wij vormen een beweging die in die kans voorziet.

5. TAALRECHTEN

De ongelijke machtsverdeling tussen de talen is een recept voor voortdurende taalonzekerheid of rechtstreekse taalonderdrukking bij een groot deel van de wereldbevolking. In de Esperantogemeenschap treffen sprekers van grote en kleine, officiële en niet-officiële talen elkaar op neutraal terrein, dankzij de wederzijdse wil compromissen te sluiten. Zo'n evenwicht tussen taalrechten en verantwoordelijkheden levert een precedent op om andere oplossingen voor taalongelijkheid en taalconflicten te ontwikkelen en op waarde te schatten. Wij beweren, dat de grote machtsverschillen tussen de talen garanties op gelijke behandeling zonder onderscheid naar taal ondergraven, zoals die in zoveel internationale documenten zijn gegeven. Wij vormen een beweging voor taalrechten.

6. TAALVERSCHEIDENHEID

De nationale regeringen neigen ertoe de grote verscheidenheid in talen in de wereld te zien als belemmering voor communicatie en ontwikkeling. Voor de Esperantobeweging, echter, is de verscheidenheid in talen een voortdurende en onmisbare bron van rijkdom. Bijgevolg heeft elke taal, zoals elke soort van leven, al waarde in zichzelf en verdient bescherming en ondersteuning. Wij beweren, dat de politiek van communicatie en ontwikkeling, indien niet gebaseerd op respect voor en ondersteuning van alle talen, leidt tot het uitsterven van de meerderheid van de talen van de wereld. Wij vormen een beweging ten behoeve van taalverscheidenheid.

7. EMANCIPATIE VAN MENSEN

Elke taal bevrijdt en beknot de sprekers ervan, enerzijds door ze de mogelijkheid te geven onderling te communiceren, anderzijds door de communicatie met anderen te belemmeren. Opgezet als een universeel communicatiemiddel, is Esperanto één van de grootste functionerende projecten van de emancipatie van mensen; een project om het ieder mens mogelijk te maken als individu deel te nemen aan de menselijke gemeenschap, met stevige wortels in zijn locale culturele en taalkundige identiteit, maar zonder er door beperkt te worden. Wij beweren, dat het exclusieve gebruik van nationale talen onvermijdelijk belemmeringen opwerpt voor de vrijheid van uitdrukken, communicatie en vereniging. Wij vormen een beweging voor de emancipatie van mensen.

Praag, 27 juli 1996.

HELPU ! HELP !

Dum la pli ol 15 jaroj de sia ekzisto, Flandra Esperanto-Ligo iĝis eldonejo fama en Esperantujo. Krom diversaj movadaj revuoj kaj deko la libroj jare, ĝia ĉefa produkto estas la revuo *Monato*. Kvankam la laborkvanto kreskis, la dungitaro restis sama kaj ne plu sufiĉas por la nunaj aktivecoj. Ne eblas simple forigi parton de la eldonoj, ĉar la eldonado kaj la pluekzisto de la centro (do de FEL) estas intime ligitaj. Sen internacia klientaro ne eblas atingi sufiĉan eldonkvanton; sen ties enspezoj ne eblas pagi la kostojn de la centro.

La nova subvenci-dekreto lasis nin revii pri plia (duontempa) dungito, sed evidentiĝis, kontraŭe, ke la plenumo de ĉiuj formalajoj por ricevi la subvencion estas preskaŭ plentaga laboro. Urĝe necesas senŝarĝigi kelkajn personojn. Tial FEL serĉas volontulojn kiu pretas asisti (de kelkaj horoj ĝis kelkaj tagoj semajne, hejme aŭ en la centro).

Perfekta kono de Esperanto necesas por jenaj taskoj:

- * Eldona agado (libroj): kunordigo inter kompostejoj, provlegantoj, presejo, aŭtoroj, ktp. Akurateco nepre bezonata ! Detala raportado (kelkfoje jare) pri la projektoj al la FEL-estraro. Pluraj gravaj libroj atendas finpretigon, ĉar iam ie io stagnis kaj estas neniu por instigi al daŭrigo.
- * Redakta sekretario por *Monato*. Kunordigo inter aŭtoroj, redaktoroj, provlegantoj, kompostejoj kaj presejo.

Ambaŭ funkcioj postulas ĉ. unu tagon semajne. Regula vizito al la centro necesas, precipe por la redakta sekretario. Se la persono havas komputilon (kun retroŝto) la vizitoj al la centro povas esti malpli oftaj kaj la laboro povas okazi grandparte hejme.

Por aliaj taskoj sufiĉas limigita aŭ bona pasiva kono de Esperanto kaj ioma kono de la movado:

- * Administrulo por oficialaĵoj: asekuroj, impostoj, parto de la subvenciosiero, publikaĵoj en *Statgazeto*... Komence li/ŝi devos eklerni la taskojn en la centro; poste la laboro povas okazi plejparte hejme.
- * Prizorganto de libroservo: mendi librojn kaj revuojn ĉe eldonejoj, kontroli stokon, korespondado kun klientoj... Proksimume unu tagon semajne, en la centro.
- * Librotenisto por foje de ekstere rigardi la kontotenadon kaj la financon situation de FEL. La strukturo de la FEL-librotenado estas sufiĉe komplika. Ekzemple: pro la internacia klientaro preskaŭ ĉiuj eblaj AVI-reguloj, reguletoj kaj esceptoj aplikeblas. Povas esti unufoja laboro (ekzemple ĝisfunda esplorado dum unu semajno) aŭ periode revenanta tasko (ekzemple unu fojon en trimestro).

Kaj fine: ĉiofaranto(j) (klusjesman/vrouw) kiu(j) povas prizorgi etajn taskojn kaj riparojn daŭre prokrastitajn pro tempomanko, aŭ - pro alkitimiĝo - ne plu vidatajn de la nuna laborantaro, sed kiu(e) gravas por la aspekto de la centro, do por nia bildo al la ekstera mondo. Ekzemple: instalado de montrofenestro en la kela etaĝo, prizorgado de la ĝardeno...

Se vi ne trovis ion por vi sur la antaŭaj linioj, kompreneble restas la redaktado de *Vertikale*, la *Fondaĵo Vanbiervliet*, la 40 lovenaj projektoj...